

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**De Sarajevo al
Tuluzo: Gasti
per Esperanto**



**Novaj Honoraj
Membroj**



**Vieno, ISO:
Terminologiaj
elpaŝoj**



Tintigu glason kun TEJO

Vi trovos...

165 Malferme

Eĉ el sub la tero aperas la vero

Kalle Kniivilä

166 TEJO 60-JARA

Jozefo Truong

*"TEJO alfrontas la
defion fariĝi tutglobe
pli profesia."*



Spomenka Šimec

168 Estraro de UEA

**Novaj agantoj kuspas
la manikojn**

Komitato de UEA 1998-2001

169 Honoraj Membroj

Gratulon al tutmonda rondo

170 KONGRESA KOMUNIKO



BTM

171 Edukado

Per interlingvo interkulturen

Ŝpari monon per Esperanto

Intervjuo kun Eryl McNally

173 Belartaj Konkursoj

Abunda pluvo da premioj

Anastasio

Poemo de Jorge Camacho

Rezultoj

174 Lastatempe

Sarajeva somero en Tuluzo

Jeanne-Marie Cash

Koutny donis salon al diskuto

Jeanne-Marie Cash

175 IFEF festis en Danio

István Gulyás

En la jaro MCMXCVIII

Johano Rapley

176 Pontoj en la lernejo

Laŭ Jennifer Bishop kaj Atilio Orellana

177 Esperantologio

La interesa "nenatureco"

Laŭ Marc van Oostendorp

Intervjuo

**Mattos: "Reciproke
konfronti opiniojn"**

178 FURORAĴOJ DE LA KONGRESA LIBROSERVO '98



Franço Veuthey

179 LASTE APERIS

180 Terminologio

Sur la spuroj de Wüster

Detlev Blanke

Gvidilo en termin-arbaro

Wera Blanke

UEA ĉe ISO

Kaj plue...

182 FAKE, PERSONE,

ANONCETOJ

184 NEKROLOGOJ

La kovrilo: Tostas TEJO-
volontulo Jordan Velikov.
(F.L. Veuthey)

Malferme: Pejzaĝo de Norda
Karelio, Finnlando. (UEA-arkivo)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establit kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66;
USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); infor-
miĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p.
1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuj
ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zapelli.



EĈ EL SUB LA TERO APERAS LA VERO

Trompi estas ne nur malbele kaj malmorale, sed kutime ankaŭ malutile. Precipe en publika informado la plej grava principo devas esti ĉiam rakonti veron, nur veron, kaj laŭeble eĉ la tutan veron. Sed por tion fari necesas unue koni la veron.

Tamen ni ofte trompas nin mem, kaj se ni trompos sufiĉe ofte, ni baldaŭ forgesos ke estas trompo. Por eviti tion, necesas honesteco, sincereco kaj malfermeco, same en la interna informfluo de nia Asocio kiel en nia ekstera informado. Ni ofte kredas ke eblas ĉirkaŭiri malfacilajn demandojn, sed preskaŭ ĉiam sincera respondo efikas plej bone.

Ĵurnalistoj demandas pri Esperanto plej ofte: “Kiom da homoj do finfine parolas ĝin?” Respondi ne estas facile, respondi honeste eĉ malpli. Ja se ni bagateligas la demandon dirante ke ne eblas scii, kompetenta ĵurnalista komprenas ke ni ruzas por eviti respondon.

Se ni estu honestaj, ankaŭ ne eblas mencii ciferojn pri dekmilionoj da esperantistoj. Sed kun trankvila konscienco eblas ripeti respondon de prof. Jouko Lindstedt: kiel unu el siaj denaskaj lingvoj parolas Esperanton ĉ. mil homoj, regule uzas la lingvon dekmilo da homoj, centmilo uzas ĝin almenaŭ de tempo al tempo, kaj eble miliono iam ĝin lernis. Tia respondo donas ne konkretajn ciferojn, sed sugestas la proksimuman kaj kredeblan grandeco-klason de ĉiu grupo, samtempe

montrante kial ne eblas doni precizan statistikon. Aldone, la demandinto ekscias pri denaskaj E-parolantoj.

Sed plej malfacila estas tamen la kutima dua demando de ĵurnalistoj: “Por kio do utilas Esperanto?”

Jes, por kio? Esperanton eblas lerni rapide — sed ĉu tio estas kialo lerni ĝin? Jes, Esperanto ebligas sen-diskriminacie interrilatadi internacie, sed ĉu tial mi parolu ĝin hejme aŭ legu originalan beletron?

Estas facile paŭsi stereotipajn respondojn el informiloj, mem paŭsitajn de pratempaj informiloj, sed pli konvinkas sinceraj kaj honestaj respondoj pri personaj spertoj. Kaj finfine ja la personaj spertoj ofte pli pezas ol teoriaj argumentoj. Pri tiuj spertoj ni rakontu kiam ni informas pri Esperanto, ankaŭ pro tio ke ĉiu homo estas vera spertulo kiam temas pri la propraj spertoj, dum pri parkerigitaj statistikaĵoj ni facile povas erari. Intervjuanta ĵurnalista tuj rimarkos heziton aŭ malsincerecon, sed se ni rakontos pri aferoj, kiujn ni mem spertis, estos neniu kialo heziti aŭ esti malsincera.

Eksteruloj ofte vidas esperantistojn kiel duonfrenezajn misiulojn, kiuj insistas uzi sian strangan lingvon en ĉiuj eblaj kaj neeblaj situacioj. La publika bildo de la movado povas iĝi pli pozitiva, se ni estas honestaj kaj rakontas ankaŭ al eksteruloj la veron pri ni mem. Sed unue ni devas ĝin ekkoni.

Kalle Kniivilä

La historio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) komenciĝis — post diversaj establoprovoj, kiel tiu de Tutmonda Esperantista Junulara Asocio (1920) — en 1938, kiam du nederlandaj pedagogoj, ges-roj van Veenendaal, organizis en Groet (Nederlando) renkontiĝon de 203 Esperanto-parolantaj gejunuloj el 9 landoj: Internacian Junularan Kunvenon. Je tiu okazo, la 16-an de aŭg. 1938, naskiĝis Tutmonda Junular-Organizo (TJO), kun la celoj propagandi Esperanton, aranĝi internaciajn renkontiĝojn kaj labori pri Esperanto en lernejoj. Tamen, TJO spertis tre fruan halton pro la dua mondmilito. Ĝi reaktiviĝis nur en 1945, per republikigo de sia gazeto *La Juna Vivo*.



"Dankon al LKK en Rijeka!"

Komence TJO estis gvidata de plenaĝuloj, sed ĝi baldaŭ fariĝis organizaĵo ĉiusekse junulara: en 1951 la estraro de TJO konsistis jam plene el junuloj. En 1952 la nomo estis oficiale ŝanĝita al la nuna formo, TEJO. Por eviti izoligon, en 1956 TEJO fariĝis junulara sekcio de UEA — reciproke utila paŝo.

TEJO

Ĉi-jare TEJO celebras jubileon kvazaŭ veteranan, rerigardante al pli ol duonjarcento da junulara laboro por krei pli riĉan kulturen mondon per Esperanto.

Sjenerika Ĥimic. Ĉiuj elstaraj: Myriam Van der Steen

La jubilea kremkukego de TEJO (1,8 X 2 m) surhavis 60 rozkolorajn kandeletojn: dolĉa simbolo de pasinteco, utilaj kalorioj por la estonteco.

Rijeka IJK: Viglaj diskutoj

Nova kasisto, nova sistemo por elekti estraranojn kaj komitatanojn B, nova landa sekcio: jen la ĉefaj rezultoj de la TEJO-komitatkunvenoj kadre de la 54-a IJK, en Rijeka (25 julio – 1 aŭgusto).

Dum kvar tagduonoj kunsidis la komitato de TEJO, post neformala renkontiĝo en la unua tago de la kongreso. Krom la kutimaj formalajoj kiel aprobo de jarraporto, la komitato en sia unua kunsidotago akceptis la aliĝon de Litova Esperantista Junulara Ligo, tiel altigante la nombron de landaj sekcioj de TEJO al 40.

Pro la demisio de la ĝistima kasisto, ekvalida la 1-an de aŭgusto, la komitato nomumis novan kasiston, Anna-Lena Eriksson el Svedio, kio kaŭzis la unikan situacion ke dum tri tagoj TEJO formale havis du kasistojn. . . Sed ankaŭ praktike Anna-Lena ne sola alfrontos la financojn de TEJO. La komitato fondis financon komisionon, kun la celo subteni la kasiston. La komisiono ne nur provizos

ŝin per praktikaj kaj teoriaj konsiloj, sed ankaŭ tre konkrete helpos ekzemple en la revizado de la IJK-librotenado. Verkota manlibro kaj librotena kontosistemo por IJK-oj plie kontribuos al pliprofesiigo de la financa administrado de TEJO.

Por certigi kunordigadon kaj interŝanĝon pri laborbrigadoj, la komitato nomumis komisionon por tiu fako. Ankoraŭ estas serĉataj homoj kiuj ŝatus organizi laborbrigadon en Portugalio, jam konkrete proponitan. Laborbrigadoj estas ne nur parto de la socia agado de TEJO, sed ili krome kontribuas al la disvastigo de Esperanto inter junuloj.

Du komitataj laborgrupoj pritraktis laontan strategion de la organizo. Unu grupo faris la unuan paŝon en strategia planado por TEJO, sekve la alia grupo ellaboris strategion specife pri seminarioj. Surbaze de la bonaj spertoj pri informada seminario en Budapeŝto (vd. jul.-aŭg. '97, p. 128), la laborgrupo proponis organizi estonte multe pli da trejnaj seminarioj ol ĝis nun. Krome estas planoj pri seminario kadre de pli granda renkontiĝo.

Grava ŝanĝo okazis en la maniero laŭ kiu estonte prezentiĝu kaj trejniĝu kandidatoj al la estraro. Por ke la laboro de estontaj estraranoj estu pli efika, nove kreita elekta komisiono konstante serĉos kandidatojn, prizorgos trejnkursojn kaj fine prezentos al la komitato taŭgajn kandidatojn. Tiel oni celas eviti improviziajn elektojn de homoj malbone preparitaj aŭ netaŭgaj. Samtempe oni forte malrekomendas ke TEJO-estraranoj havu tro temporabajn aliajn postenojn.

Ankaŭ la elektoproceduro de komitatanoj B ŝanĝiĝis, parte laŭ la modelo de UEA. Por kandidatiĝi, interesitoj de nun devos kolekti subskribojn aŭ rekomendojn de almenaŭ 5 individuaj membroj el minimume 2 landoj, konforme al la ideo ke komitatano B reprezentas ĝuste la individuajn membrojn.

Ĝenerale la komitatkunvenoj estis karakterizitaj de viglaj diskutoj kaj intensa laboro ankaŭ ekster la kunvenoj. Je la fino, la estraro esprimis la deziron ke same viglu la kontribuoj al cirkuleroj kaj diskutoj dum la jaro.

Sjoerd Bosga, estrarano pri informado

60-jara

Kreinte bazon, TEJO ek-rilatis al junularaj organizoj ne-esperantistaj. Ĝia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj iĝis aparte aktiva en ĉi tiu periodo. Krom eldono de novaĵletero celanta eksterajn organizojn, ĝi aranĝis en Jugoslavio la unuan el longa serio de seminarioj pri sociaj kaj kulturaj problemoj, en septembro 1965.



Karnavala etoso en Rijeka



TEJO-estraranoj pozas en Rijeka. De maldekstre: Sjoerd Bosga, Jozefo Truong kaj Jeroen Balkenende.

"T" de "tutmonda"!



La 60-aj: Progreso, ŝanĝoj

Por TEJO la fino de la 50-aj jaroj kaj la jaroj 60-aj kunportis — same kiel en la cetera junulara socio — fortan emon al progreso kaj ŝanĝo: TEJO organizis unuafoje sian kongreson en socialisma lando en

1959 (15-a IJK, Gdańsk, Pollando), kreis sian unuan laborplanon, ekeldonis por junuloj la internacian revuon *Elingvan Kontakto* kun socia kaj kultura temaro, kaj en la 70-aj jaroj adaptis el Argentino tutmondan sistemon de gastigantoj por vojaĝantaj esperantistoj, Pasportan Servon. En 1962 TEJO iĝis tutmonda ne nur laŭnome: en tiu jaro aliĝis sekcioj en Japanio, Madagaskaro kaj Usono.

La 70-aj kaj 80-aj: Kreskanta kunlaboro

TEJO daŭre plifortigis kaj evoluigis sian laboron dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj, plibonigante la servojn kaj projektojn jam ekzistantajn. Granda paŝo en la evoluo de TEJO estas organizi seminariojn por gejunuloj pri nuntempaj sociaj temoj ĉe Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo (Francio) kaj kreskigi sian kunlaboron kun eŭropaj junularaj instancoj. Tamen, la ĉefa evento de la 1980-aj jaroj estis la centjariĝo de Esperanto en 1987, kiun TEJO celebris i.a. per la plej granda IJK iam ajn organizita (43-a IJK, Krakovo, Pollando).

La 90-aj: La defio de profesieco

En la 90-aj jaroj TEJO alfrontas unuavice la defion fariĝi pli profesia sur tutgloba nivelo. La ĉefaj publikigaĵoj de TEJO, aparte *Kontakto*, spertis frapajn ŝanĝojn por pli bone plenumi la dezirojn de legantoj; TEJO funkciigis kelktempe oficejon en Bonn, aldone al sia Centra Oficejo en Roterdamo; kaj la organizo pli aktive engaĝiĝis pri junulara politiko kaj agado ĉe Eŭropa Junulara Forumo kaj UN.

Celebrado de la 60-jara datreveno de TEJO okazis en la ĉi-jara, 54-a IJK en Rijeka (Kroatio).

Jozefo Truong
Prezidanto de TEJO

Gastigu = gajnu!

En 1999 Pasporta Servo festos sian 25-jaran jubileon. Ĉu per rekorda eldono? Ni atingu la magian nombron de 1000 gastigantoj!

Pro tio ni ĉi-foje, *se ariĝos 1000 gastigantoj ĝis la limdato 1 nov. 1998*, lotumos tri libroĉekojn de po 100 NLG inter la gastigantoj de Pasporta Servo! Fariĝu



gastiganto nun, kaj eble vi gajnos premion.

1. Unu premion ni lotumos inter la novaj gastigantoj en landoj kiuj en la eldono 1998 havis tri gastigantojn aŭ malpli;
2. unu inter la gastigantoj en 1998 kiuj varbis almenaŭ unu novan gastiganton;

3. unu inter ĉiuj gastigantoj de la eldono 1999! Ĉu vi ne scias kio estas Pasporta Servo? Rigardu la hejmpaĝon <http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.html>. Aliĝilo: <http://home.wxs.nl/~lide/aligxilo.txt>.

Pli da informoj pri PS, detala artikolo por via gazeto aŭ aliĝilo haveblas ankaŭ laŭ ret-poŝta peto: pasporta.servo@esperanto.nu.

Derk Ederveen,
kompilanto de Pasporta Servo

Keppel E. ENDERBY (1926, 1987*), aŭstralia politikisto, juĝisto, advokato. Instruante juron en Aŭstralia Nacia Universitato, li elektigis al la federacia parlamento en 1970; estis (1972-75) ĝenerala prokuroro, ministro pri justeco kaj estrarano de Aŭstralia Laborista Partio. Juĝisto de la Supera Kortumo de Nova Sud-Kimrujo (1982-92). Li prezidis Aŭstralian Esperanto-Asocion (1992-98) kaj LKK de la 82-a UK en Adelajdo. Li prezidis E-an Juran Asocion (1996-) kaj estas komitatano de UEA (1992-).

D-ro Renato CORSETTI (1941, 1968), italo, esploristo, psikolingvisto ĉe Universitato de Romo. Multifunkcie aktiva en la faka, landa kaj internacia movadoj, i.a. kiel estrarano de Itala E-Federacio (1971-); TEJO-estrarano (1970-72) kaj -prezidanto (1972); komitatano (1974-), estrarano (1980-86) kaj vicprezidanto de UEA (1983-86). Ano de la Elekta Komisiono (1993-98) kaj de la Komitata komisiono por Kampanjo 2000 (1997-). Aŭtoris, kunverkis aŭ redaktis i.a. la sukcesan lernolibron *Ĉu vi parolas tendare?* (4 eldonoj), konsilaron pri plurlingva edukado kaj eldonaĵojn interlingvistikajn. Akademiano (1998). Dumviva membro, delegito.

Estraro de UEA

Novaj agantoj kuspas la manikojn

Ĉiu membro de la nova UEA-estraro estas sperta movada aktivulo: jen koncizaj notoj pri ilia ĝisnuna vojiro Esperanta.



Michela LIPARI (1948, 1966), italino, ŝtata funkciulo ĉe la trezoreja ministerio. Ŝi redaktis la junularan bultenon *Koncize* (1972-76), estis estrarano de Itala E-ista Junularo (1970-74), de Itala E-Federacio (1971-91), komitatano (1977-) kaj estrarano de UEA (pri kongresoj kaj kulturo 1992-96, ĝenerala sekretario 1996-).

D-ro Petro CHRDLÉ (1946, 1960*), ĉeĥo, estro de vojaĝa kaj eldona agentejo. Gvidanto de la fake aplika komisiono de Internacia Fervojista E-Federacio (1985-92), senata sekretario de AIS (1991-95), prezidanto (1987-93) kaj vicprezidanto (1993-) de Ĉeĥa E-Asocio, komitatano A (1987-92) kaj C (1998-) de UEA. Lia eldonejo Kava-Pech publikigis ĝis nun 21 titolojn en Esperanto kaj pliajn E-rilatajn; li mem aŭtoris profesiajn tekstojn, E-lernolibron kaj multajn fakajn artikolojn.

GBEGLO Koffi (1957, 80-aj jaroj), instruisto pri matematiko en Togolando. Delegito ekde 1986, ĉefdelegito de 1993. Vicprezidanto de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (1994-), kies bultenon *Alvoko* li redaktas. Aŭtoris i.a. la beletrajn verkojn *Mi vizitis grandan urbon* (1989) kaj *De vilaĝo al ĉefurbo* (1993), la lernolibron *Prenu plu!* (1995) kaj la gramatikan eseon *La tabelo* (1997); abunde verkis artikolojn kaj rakontojn por *Kontakto*, *Monato* ktp. Ano (1994-) de la Internacia Ekzamena Komitato por la ILEI/UEA-ekzamenoj.

Kalle KNIIVILÄ (1965, 1982), finno, ĵurnalisto. Pli frue Moskva korespondanto de la finna gazeto *Kansan Uutiset*, nun laboras ĉe ĵurnalo en Svedio. Redaktoro de *TEJO Tutmonde* (1993-97), LKK-membro pri ekstera informado en Tampere (1995). UEA-komisiito pri informado (1997-98), li kunorganizis seminarion pri amas-komunikiloj en Montpeliero kaj kunlaboras kun la CO i.a. por ĝisdatigi, ampleksigi kaj plurlingvigi la TTT-paĝojn de UEA. Li elsvedigis la aperontan libron *Kaoso en Budapeŝto* pri la E-pioniro Valdemar Langlet (vd. '95 majo, p. 82). ★

*Dua jarĉifero indikas la daton de esperantistiĝo.

Komitatanoj A: M.F. de Bastos (PT*), J. Bishop (AU; ILEI), L. Brazzabeni (IT), A. Bute (RO), P.

Chong (KR), Dai Song-en (CN), C. Darbellay (DE), M. Delforge (BE), R.T. Diaconu (AR), K.E. Enderby (AU), I. Ferenczy (HU; UMEA), G. Greatrex (GB), M. Grosjean (CH), A. Grzybowski (PL; Monda Turismo), I. Gulyás (HU; IFEF), H. ten Hagen (NL), W. Harmon (US), J. Hernández (CU), L.E. Hernández (ES), R. Hirsch (DE; ELF/AREK), C. Jauca (CA), P. Jegorovas (LT), A. Junusov (RU), A. Karvinen (FI; LIBE), W. Kirschstein (DK), V. Kočvara (CZ), N. Korjenskaja (FR; ISAE), E. Kovtonjuk (UA), T. Kvakland (NO), J. Laaksonen (FI), S. Ledon (BR), R. Lindblom (SE), M. Lins (DE), F. Luin (SE), S. Mandrak (PL), J.S. Meyer (LU; TEJO), B. Moon (LU), C. Nourmont (FR), L. Patek (AT), R. Petrović (YU), G. Polerani (IT; IKEF), O. Princz (HU), S. Ribić (BA), B. Rozenfelde (LV), SATOO S. (JP), SyŌzi K. (JP), J. Šemer (IL), S. Štítec (HR), TAN Xiuzhu (CN), E. Tantin Ackermann (IT),

Komitato de UEA 1998-2001

P. Todorov (BG), M.R. Torabi (IR; TEJO), R. Triolle (FR), J. Zadavec (SI).

Komitatanoj B: K. Fetes-Tosegi

(AT), A. Korjenkov (RU), LEE Chong-Yeong (KR), M. Lipari (IT), A. Orellana (AR), A. Pettyn (PL), A. Wandel (IL), Yamasaki S. (JP).

Komitatanoj C: H. Bakker (NL), P. Chrdle (CZ), R. Corsetti (IT), L. Demmendaal (NL), B. Despiney (FR), M. Fettes (CA), J. Franquesa (ES), GBEGLO K. (TG), HUZIMOTO T. (JP), K. Kniivilä (SE), U. Lins (DE), G. Maertens (BE).

Observantoj: M.B. Agbemadon-Attigbo (TG), J. Bachrich (VE), C. Beckford (ZA), A. Kaljusaar (EE), M. Mullarney (IE), N. Nangu (CD), H. Sæmundsson (IS), A. Salam (IN), J. Vella Bondin (MT).

Komitatanon A aŭ observanton ankoraŭ ne nomumis la landaj asocioj de Armenio, Ĉilio, Ebura Bordo, Greklando, Kolombio, Meksiko, Nov-Zelando, Peruo, Slovakio, Urugvajo kaj Vjetnamio.

*Listo de la ISO-landokodoj estas trovebla en la Jarlibro, p. 302.

André ALBAULT (1923, 1939*), Francio. Okul-kuracisto. Plej konata pro sia rolo en Akademio de Esperanto — unue sekretario (1963), poste direktoro de la sekcio pri komuna vortaro (1965-76) kaj prezidanto dum kvar mandatoj (1983-95) —, Albault funkciis tamen ankaŭ kiel vicprezidanto de Universala Medicina E-Asocio (1974-76), prezidanto de Unuiĝo Franca por E-o (1967-74); komitatano (1957-69) kaj kultur-faka estrarano (1962-67) de UEA. Li redaktis la revuojn *Internacia Pedagogia Revuo* (1958-59) kaj *Monda Kulturo* (1964-66). Albault kunlaboris pri la medicinaj terminoj kaj la reviziado de PIV, publikigis sen-nombrajn artikolojn, enkondukis kaj prinitis la 9-an eldonon de *Fundamento de Esperanto* (1963) kaj verkis i.a. *Vortaro franca-esperanta* (1961, kun R. Léger), *Naŭ prelegoj pri la Fundamento* (1990), *Vojaĝo tra la landoj kaj Multlingva glossaro pri landnomoj* (1991).



Saburo YAMAZOE



Claude PIRON

Pierre BABIN (1919, 1947), Francio. Emerita inspektoro pri la angla lingvo. Li estis direktoro (1966-92) de "kastelo Grésillon" (Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj) kaj plu direktoras ties revuon *Kulturaj Kajeroj* (1959-). Babin estis estrarano de UFE (1975-79) kaj prezidis Francan E-Instituton (1989-98). Li ofte gvidis E-kursojn en la urboj Nantes, Tours, Bouresse ktp kaj verkis la progresigan E-lernolibron *Por la praktikantoj* (5 eld. de 1957). Multjara UEA-delegito.

Ignat BOCIORT (1924), Rumanio. Universitata profesoro. Antaŭ la malpermeso de Esperanto en Rumanio, inter 1969 kaj 1978 li amase prelegis en universitataj kaj akademijaj rondoj kaj sukcesis en 1978 enkonduki E-on kiel egalrajtan kurson en la filologiaj fakultatoj. Samjare li starigis la unuan ĝermon de oficiala movado, Kolektivon Esperanto kaj Interlingvistiko,

kio poste ebligis la estigon de E-sekcio en tutlanda asocio de filologoj, aperigon de vortaroj kaj lernolibroj ĉe universitataj eldonejoj ktp. Bociort iĝis en 1990 prezidanto (poste honora prezidanto) de E-Asocio de Rumanio. Ekde 1992 li estas dekano ĉe AIS.



André ALBAULT

Honoraj Membroj

Gratulon al tutmonda rondo

Lingvaj, verkistaj kaj organizaj meritoj de ses movadaj elstaruloj estis honorige rekonataj en Montpeliero.



William R. HARMON

William R. HARMON (1927, 1939), Usono. Profesiulo pri transporto fervoja, poste mara. Marsoldato dum la dua mondmilito, li instruis E-on sur militŝipo (1945-47). Aktivis en la kluboj de Los-Anĝeleso kaj Long Beach, kaj dum tri jaroj en pluraj E-organizoj en Japanio. Li ofte prelegis en Japanio kaj Ĉinio. Harmon aktivas ekde la fondo (1952) en la usona landa asocio ELNA, kies nunan Centran Oficejon li establis en 1975. Kungvidinte ELNA kiel estrarano (1958-60, 1966-97), prezidanto (1976-81) kaj estrarestro (1965-67), li estas ĝia honora membro de 1992. Longtempa UEA-membro, li servas kiel delegito de jar-

dekoj, ĉefdelegito ekde 1987, kaj Komitatano A de 1992. De 1993 li aktivas en la Elekta Komisiono. Harmon multe artikolis kaj prelegis pri Esperanto kaj tradukis la verkojn *Mia indiana knabeco* kaj *Rakontoj de la Sioj* de Ĉefo Luther Standing Bear.

Claude PIRON (1931, 1942), Belgio/Svislando. Tradukisto-protokolisto ĉe UN kaj ĉe Monda Organizo pri Sano, poste psikologo, psikoterapiisto. Kun-



Pierre BABIN



Ignat BOCIORT

fondinto (1958) de E-klubo ĉe UN, redaktoro de *Svisa Espero* en la 60-aj jaroj. Li multfoje instruis pri psikologiaj kaj lingvaj temoj en Esperantaj medioj. Jam en 1955 li gajnis poezian premion en Belartaj Konkursoj kaj publikigis ekde 1976, sub la plumnomo Johán Valano, dekon da verkoj: la detektivromanon serion *Ĉu...?*, novelaron, poemaron, kantonkasedon. Propranome li verkis kurson de psikologio, facillingvaj romanejoj, tri kajerojn de *E-Dokumentoj*

de UEA, unu el la plej legataj E-libroj de la lastaj jardekoj, *La bona lingvo* (1989, 1997), kaj la franclingvan *Le défi des langues* (1994). En 1993 li gajnis Premion Deguč.

Saburo YAMAZOE (1908, 1928), Japanio. Profesoro de medicinaj sciencoj, biokemiisto. Dumviva membro de Japana E-Instituto, multjara UEA-delegito. Prezidanto de Japana Esperanta Medicina Asocio. Ĝenerala sekretario (1970-89) kaj kasisto (1976-) de Universala Medicina E-Asocio, ĉefa redaktoro (1976-93) de *Medicina Internacia Revuo*. Yamazoe aŭtoris en Esperanto gravajn fakajn artikolojn kaj la verkojn *Esperanta medicina literaturo inter 1951 kaj 1986*, *Angla-Esperanta medicina terminaro* kaj *Dieta fibro — ĝiaj difinoj kaj klasifikoj*. ★

*Eventuala dua jaro indikas la daton de esperantistiĝo.



Berlin, Tourismus Marketing

84-a Universala Kongreso de Esperanto

Berlino, 31 julio – 7 aŭgusto 1999

Adresoj

Konstanta: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
LKK: Fritz Wollenberg, Bergener Str. 12, DE-10439 Berlin, Germanio.

Kongresejo

La granda kaj moderna Internacia Kongresa Centro (ICC), facile atingebla publik-transporte, situas en la Berlina Foirejo (okcidenta urboparto). Ĝi certe viciĝos inter la plej taŭgaj kongresejoj kiujn ni iam ajn havis.

Eminentuloj

Alta Protektanto: la federacia prezidento Roman Herzog, jama patrono de la 52-a IJK (1996, Güntersberge).
Honora Komitato: inviton al ĝi jam akceptis trideko da publikaj personoj kaj germanaj famuloj el ĉiuj kampoj.
Rektoro de IKU: Nobel-premiito Reinhard Selten, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Kongresa Temo

“Tutmondigo — ŝancoj por paco?”. Ĝian traktadon kunordigos la reĝisoro d-ro Vilmos Benczik (Egressy köz 6, HU-1149 Budapest, Hungario; ☎+36/1/363-02-76; ☎221-63-37; ✉trezor@mail.matav.hu).

Vizoj, invitiloj

Ĉiuj vizbezona kongresano ricevos inviteletron de UEA, kiel pruvon pri la aliĝo, sed gravas konscii ke tio ne aŭtomatigas la ricevon de la vizo, kion nek UEA nek LKK povas garantii. Informiĝu rapide pri la precizaj kaj komplikaj postuloj de la germanaj konsulejoj.

Loĝado

UEA rezervis plurajn hotelojn kun bonega trafika situo. En januaro aperos la Dua Bulteno kun ĉiuj detaloj kaj mendiloj.

Afiŝo

kolora, kun foto de la kongresejo, haveblas ĉe la CO kontraŭ sendkosto.

Unua Bulteno

Plaĉa prospekto plurkolora, ĝi prezentas la kongresan landon kaj urbon. Laŭ peto, la CO senpage sendas ĝin al kluboj, renkontiĝoj kaj inviduoj.

TTT

Hejmapaĝoj troveblas:

Germanlingve: <http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/uk.html/>.
Esperante: <http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/esp.html/>.

Junulara programo

Preparata de David-Emil Wickström (Weselerstr. 17, DE-10318 Berlin-Karlshorst; ☎+49/30/508-40-11; ✉david@frisch.be.schule.de) kaj lia teamo. Ankaŭ pri junulara amasloĝejo kontaktu lin rekte, prefere kun kopio al UEA.

Infana kongreseto

Gepatroj de E-parolantaj infanoj de 6 ĝis 14 jaroj kontaktu Sabine Trenner, Ebertystr. 46, DE-10249 Berlin; ☎+49/30/426-86-05; ✉trine@snaful.de.

Kotizoj

Ĝis la fino de la jaro validas jena tarifo: individua membro de UEA (IM) 295 guldonoj (el B-kategoriaj landoj: 225 gld.); ne-IM — 370 (280); komitatano de UEA, kunulo, junulo mem IM 150 (112), ne-IM 225 (170). Germanaj esperantistoj ricevis aliĝilojn kun kotizoj en germanaj markoj kaj pagas rekte al la LKK-kasisto.

Ĝis la fino de septembro la CO ricevis jam la aliĝon de ĉ. 600 kongresanoj el 40 landoj. Plej multaj aliĝoj venis el Germanio, Francio, Japanio, Pollando kaj Nederlando.

Per interlingvo interkulturen

Sub la aŭspicioj de Unesko, la Montpeliera UK donis lokon al simpozio pri "Lingvopolitiko kaj interkultura edukado: perspektivoj por Esperanto".

En tri temogrupoj prelegis fakuloj plejparte esperantistaj, kun interpretado al-orela al tiuj kiuj bezonis. La parton "Lingvoj kaj interkultura edukado" enkondukis Jane Edwards, sufiĉe pesimisma pri la usonaj sintenoj al lingvoj rilate interkulturecon. Philia Thalgott, de Konsilio de Eŭropo, raportis detale pri ties lingvopolitiko; Ron Glossop emfazis la gravecon de E-o por mondcivitaneco; Marc van Oostendorp skizis la projekton NEIGHBOUR. Helmar Frank resumis la Paderbornajn spertojn pri "Lingvoorientigo kaj kulturo", kaj J. Sánchez-Verdejo traktis pri motivado kaj intereso ĉe instruanto kaj lernanto.

Sub "Lingvoinstruado en lernejo" prelegis i.a. Luigia Acciaroli pri planado



Prelegas Luigia Acciaroli (Universitato Roma Tre)

kaj kontrolado de lingvolernaj procedoj, Paul Gubbins pri la ofta malfreseco de E-studmaterialoj, Katalin Smidélusz pri trejnado de E-lingvo-instruistoj kaj WEI Yuanshu pri la E-instruado en superaj lernejoj de Ĉinio.

La tria, fina parto de la simpozio konsistis el kontribuoj de Mauro La Torre, Ian Fantom, Marija Belošević kaj Mireille Grosjean ĉirkaŭ la koncepto "interkulturo" (vd. artikolon de La Torre en jun., p. 118).

Ŝpari monon per Esperanto

Brita ano de Eŭropa Parlamento (EP), Eryl McNally, ĉeestis kaj alparolis la simpozion. Ni demandis ŝin pri ŝia simpatio por Esperanto.

Kiel vi kontaktis Esperanton?

Denaska parolanto de la kimra lingvo, mi estis ĉiam sentema al lingvaj demandoj, kaj tial mi volonte plenumis lecionojn de la koresponda lingvo-kurso de Esperanto-Asocio de Britio. Mi konvinkigis ke esperantistoj devus fari multe pli por lobi ĉe eŭropaj kaj naciaj parlamentanoj, ankaŭ ĉiu ĉe sia propra deputito. Tion ja efike faras, ekzemple, defendantoj de bestaj rajtoj.

Al vi kiaj argumentoj ŝajnas uzendaj en tiu lobiado?

Ŝparo de mono estas ĉiam bona argumento. Per Esperanto ja eblus ŝpari monon, ĉu en la instruado de fremdaj lingvoj ĉu en la sino de la eŭropaj instancoj.



Eryl McNally

Kian sintenon havas viaj kolegoj en Eŭropa Parlamento?

Ekzemple, la danaj parlamentanoj preskaŭ ne aŭskultas la interpretadon al ilia lingvo, sed — evidente — eĉ la danoj ne akceptus malplian statuson por sia lingvo.

Ĝuste danoj iam proponis ke ĉiu deputito parolu en EP en alia eŭropa lingvo ol la sia...

Tio ne eblus pro la kontraŭstaro de denaskaj parolantoj de la "grandaj" lingvoj. Mi mem favoras solvon de la eŭropa lingva problemo pere de Esperanto, sed miaj kolegoj konvinkigis nur pere de via agado. Mi ja informos miajn samparlamentanojn, sed vi alskribu mem viajn eŭro-deputitojn.

Starto en Poznań

Dek studentoj (el Belgio, Germanio, Makedonio, Nederlando kaj Pollando) partoprenis (24-28 aŭg.) la unuan sesion de postdiplomaj studoj interlingvistikaj ĉe Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando).

La lokaj amas-informiloj vigle interesiĝis pri la nova studfako, en kies fokuso staras studoj interkulturaj — kiel emfazis ankaŭ la dekanato de la Novfilologia Fakultato dum la malfermo.

La intensajn kursojn gvidis prof. John Wells (ĝenerala kaj Esperanta fonetiko), d-rino Ilona Koutny (komunikado en teorio kaj praktiko), d-ro Zbigniew Galor (enkonduko al la E-kulturo) kaj mag. Lidia Łigęza (E-literaturo, unua periodo).

Sekva sesio de la 3-jara ekstera studado: en februaro. Eblos aliĝi al la studoj ankaŭ en la sekva studjaro. Informoj: d-rino Ilona Koutny, Lingvistika Instituto, UAM, Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań; ☎/✉ +48/61/861-85-72 aŭ 817-28-73; ✉ ikoutny@amu.edu.pl.

KOTIZTABELO DE UEA POR 1999

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/ <i>guldeno</i>	8	21	53	32	20	106
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Brazilo/ <i>guldeno</i>	8	21	53	32	20	106
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Bulgario/ <i>guldeno</i>	8	21	53	32	20	106
Ĉeĥio/krono	150	400	1000	600	350	2000
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/marko	15	37	93	59	36	186
Greklando/drakmo	1700	4200	10600	6800	4100	21 200
Hispanio/peseto	1000	2500	6250	4000	2400	12 500
Hungario/forinto	1100	2700	6800	4100	2500	13 600
Irlando/pundo	6	15	37	23	14	74
Islando/ <i>guldeno</i>	17	42	105	63	38	210
Israelo/ <i>guldeno</i>	14	34	86	52	31	172
Italio/liro	14 000	34 000	86 000	55 000	33 000	172 000
Japanio/eno	1200	2900	7300	4400	2600	14 600
Kanado/dolaro	13	33	82	49	29	164
Korea Resp./ <i>guldeno</i>	11	28	69	41	25	138
Nederlando/ <i>guldeno</i>	17	42	105	67	40	210
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Pollando/ <i>guldeno</i>	8	21	53	32	20	106
Portugalia/eskudo	1000	2600	6500	4100	2500	13 000
Rusio/ <i>guldeno</i>	8	21	53	32	20	106
Slovakio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Sud-Afriko/ <i>guldeno</i>	15	38	94	56	34	188
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	10	24	60	36	22	120
TARIFO A/ <i>guldeno</i>	11	28	69	41	25	138
TARIFO B/ <i>guldeno</i>	8	21	53	32	20	106

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Homrajta apogo

UEA aŭspicias la nomkolektadon de Japania E-Instituto apoge al la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj al la lingvaj rajtoj. Oni trovas ĝin en TTT: http://www2s.biglobe.ne.jp/~jei/hp/materialo/rajto_e.htm/. Pape-rajn ekzemplerojn petu de UEA (vd. la kolofonon) aŭ de JEI (☎+81/3/32-03-45-82). JEI celas transdoni la subskribojn al UN la 10-an de dec., je la 50-a datreveno de la Deklaracio.

La Esperanta traduko de la Deklaracio estas havebla ĉe UEA. Ĝi troviĝas ankaŭ en la TTT-ejo de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj: <http://www.unhchr.ch/html/menu6/1/esperant.htm>.

Internacia Kongresa Universitato

En Berlino okazos la 52-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj aŭ personoj simile kvalifikitaj. Prelegproponojn oni prezentu al la sekretario de la IKU-komisiono: prof. d-ro H.M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio; ✉maitzen@avia1.una.ac.at. La propono enhavu koncizajn prelegresumon (maks. 200 vortoj) kaj biografion kun persona bibliografio. La prelego laŭeble (ne devige) rilatu al la kongresa temo, "Tutmondiĝo — ŝancoj por paco?". La elektitaj prelegantoj ricevos modestan honoraron, sed ne repagon de siaj kostoj. Ĉiuj prelegantoj devas esti kongresanoj kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenaj estas junaj kandidatoj kaj unuafojaj IKU-prelegantoj. **Limdato por kandidatiĝo: 15 jan. 1999.**

Ame kaj klere
verkita klasikaĵo:

Vivo de Zamenhof

(1920)

de Edmond Privat

134 p. 18 cm.

Bind. 18,90 gld.

Triona rabato ekde tri ekz.

Abunda pluvo da premioj

En jaro de granda UK multas ankaŭ la partopreno en la Belartaj Konkursoj de UEA.



Al Lena Karpunina (maldekstre) Renée Triolle enmanigis du diplomojn.

En 1997 la ĵurion laborigis 76 verkaĵoj, dum ĉi-jare la rikolto estis je duono pli granda: 118. En pli granda kvanto troviĝis ankaŭ pli da kvalito. Pasintjare nur en tri el la sep branĉoj oni trafis verkon indan je la plej alta rango. En Montpeliero oni anoncis ses unuajn premiojn.

Ankaŭ ĉi-jare la listo de Novaj Talentoj (Jarlibro 1998, p. 88) ne ricevis daŭrigon. Feliĉe novaj talentoj tamen ne mankas, sed lastatempe ili rekte konkeris "ordinaran" premion. Ĉi-jare unuafojulo el Finnlando, Anja Karkiainen, fariĝis eĉ laŭreato de la unua premio pri poezio.

La unua premio por teatraĵo aŭ kanto estas raraĵo. En Montpeliero aperis sensacio, ĉar oni aljuĝis ĉiujn premiojn en tiuj branĉoj. La venkinta kanto de Alejandro Cossavella el Argentino plaĉis ne nur al la juĝantoj: en la Internacia Arta Vespero la publiko krome premiis ĝin per tondra aplaŭdo.

ob

P.S. Multaj el la premiitaj literaturaĵoj intertempe aperis en *Fonto*.

Poezio, tria premio
JORGE CAMACHO

Anastasio
(1928-1996)

La lastan fojon, kiam mi lin vidis,
li venis min viziti, kelkajn tagojn.
Poste li iris for. Se mi sciintus,
ke nur monatojn poste li mortiĝos,
ĉu mi parolus ion? Ni ne diris
ion alian ol "Ĝis julo, kara".
Malfrua vok' transdonis la mesaĝon
kaj solitero pansis la malnokton.
Jam unu jaron mi bezonas vorti.
Silent' ne eblas. Rimoj, ritmoj ĝenas.
Ĉu eblas vivosperton komuniki?
Manrique diris ĝin antaŭ jarcentoj
okaze de la mort' de lia patro.
Ankoraŭ ne finiĝis la stuporo.

Manrique, Jorge: hispana poeto (1440-1479), aŭtoro de "Elegio je la morto de lia patro" (Esperanta traduko en la antologio *Sentempa simfonio*).

Rezulto de Belartaj Konkursoj de UEA 1998

POEZIO: **Unua premio:** Anja Karkiainen (Finnlando) pro *Sorĉa hor' de kreiveco*. **Dua premio:** ne aljuĝita. **Tria premio:** Jorge Camacho (Belgio) pro *Anastasio*. **Honora mencio:** Jorge Camacho pro *Kavernaj pensoj*. Partoprenis 51 verkoj de 27 aŭtoroj el 18 landoj.

PROZO: **Unua premio:** Stefan MacGill (Hungario) pro *Antaŭ la Di-servanto*. **Dua premio:** Jorge Camacho pro *Atesto kaj Sten Johansson* (Svedio) pro *Meti limon*. **Tria premio:** Jorge Camacho pro *Familio Pork*. **Honora mencio:** Lena Karpunina (Germanio) pro *Miŝka Voropajev kaj Bela*. Partoprenis 34 verkoj de 19 aŭtoroj el 15 landoj.

TEATRAĴO: **Unua premio:** Stefan MacGill pro *La martelo*. **Dua premio:** Paul Gubbins (Britio) pro *Atendejo Esperantujo*. **Tria premio:** Paul Gubbins pro *Rubrike*. Partoprenis 6 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

ESEO: **Unua premio:** (Premio Luigi Minnaja): Gerrit Berveling (Nederlando) pro *Inter religia toleremo kaj socia akceptiĝo: pri la islama minoritato en Nederlando*. **Dua premio:** ne aljuĝita. **Tria premio:** Zlatko Tišljar (Slovenio) pro *Eŭropa ideologio*. Partoprenis 6 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj.

KANTO: **Unua premio** (Premio Ahn Song-san): Alejandro Cossavella (Argentino) pro *Ĉe Montpellier*. **Dua premio:** Martin D. Czesla (Germanio) pro *Prediko pri bona sinteno*. **Tria premio:** Aldo kaj Fiorello Fiorentin (Italio) pro *Igu, Sinjoro! kaj Suferinte, oni esperas*. **Honora mencio:** Flávio Fonseca (Brazilo) pro *Rozkolora*, kaj Flávio Fonseca kaj Valéria Fajardo (Brazilo) pro *La esteco*. Partoprenis 11 kantoj de 6 aŭtoroj aŭ aŭtorduopoj el 6 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO 1997: *La senĉesa rakonto* de Michael Ende, tradukita de Wolfram Diestel, ilustrita de Ulrike Diestel, eldonita de Germana Esperanto-Asocio kaj Inter-kulturo. Partoprenis 7 libroj.

VIDBENDO: **Unua kaj dua premio:** ne aljuĝitaj. **Tria premio:** *Neide deklamas* de Neide Barros Rêgo (Brazilo). Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

Sarajeva somero en Tuluzo

De pluraj jaroj ekzistas kontaktoj inter E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH) kaj E-Kultur-Centro (EKC) de Tuluzo.

En julio 1997 EKC informis Senad Čolić, la prezidanton de ELBiH, pri la intenco inviti dek E-parolantajn lernejanonj el la regiono de Sarajevo. Samjare ekfunkciis E-kursoj en kvar diversaj lernejoj Sarajevaj kaj en la proksima Zenica. Post interkonsiliĝo, Senad elektis infanojn diverslokajn por la vojaĝo al Tuluzo, komencantojn kaj flue parolantojn.

Kaj kio okazis dume ĉe la francoj? Anoncis instruistino pri matematiko: "Se vi deziras korespondi kun infanoj de Sarajevo, eble eĉ renkonti ilin, venu al..." La proponita E-klubo kun ambicia celo allogis Aurélie, Mathieu, Yves, Mathilde... entute pli ol dudek lernejanonj. Fine restis dek kvin, kiuj regule lernis la lingvon ĉiusemajne en tagmeza paŭzo. Poste la gepatroj estis invititaj: sep aŭ ok familioj preskaŭ ĉiuj konsentis gastigi bosnian infanon.

Kaj fine, la 30-an de junio, la bosnia buseto alvenis! Ĉiuj klubanoj atendis la bosniajn infanojn antaŭ la preĝejo de Castanet. Emocia momento: ĉi tiuj,



Komplazo de Jeanne-Marie Cash

vojaĝintaj pli ol tridek horojn, devis nun disiĝi por iri al la gastigaj familioj.

Dino, la plej juna, tute ne parolis Esperanton; feliĉe Tarik, akceptita en la sama familio ĉe Yves, iom komprenis. En alia familio oni komunikis per gestoj kaj anglaj vortoj, ĉar la gepatroj ja ne lernis E-on. Sed en la gastiga familio de Denisa kaj Anida oni ja devas uzi Esperanton, ĉar Mathilde kaj Amandine ne scias la anglan.

Vilaĝo komprenanta Esperanton

Dum sia 12-taga restado la bosniaj gejunuloj ekskursis al la historia urbocentro de Tuluzo, al la Spacmuzeo, la mezepoka civito Carcassonne... kaj al la montara restadejo La Maraude en Pireneoj, kie la konstantaj loĝantoj ĉiuj komprenas Esperanton. De tie ni migris al purakvaj lagoj kaj torentoj, pasigis du noktojn en montara rifuĝejo, kie ni kantis ĉirkaŭ lignofajro en diversaj lingvoj... Kelkaj infanoj eklernis prizorgi kaprinojn kaj fari fromaĝon; ĉiuj lernis baki panon. Okazis piedpilka matĉo inter la esperantistoj kaj la aliaj infanoj de La Maraude, kaj la vilaĝestro varme akceptis en sia hejmo la bosnianojn por spekti la gravegan finalon de la futbala mondĉampionado!

Ekestis interesa grupdinamiko: en la unuaj tagoj la bosniaj infanoj emis resti inter si (sekve ankaŭ la francoj), sed iom post iom la roloj ŝanĝiĝis, kaj la knabinoj kiuj interamikiĝis dum la familia restado, pli kaj pli ofte amuziĝis kune. La apartiĝo estis tiam inter knaboj kaj knabinoj; la lastan tagon ĉiuj knabinoj preferis resti kunaj.

Kio okazos nun? Ĉu la korespondado plu daŭros? La infanoj invitis la familiojn ĉe sin en Sarajevo: ĉu la reciproka vojaĝo realiĝos? Ni sekvu iliajn postajn aventurojn!

Jeanne-Marie Cash (Francio)

Koutny donis salon al diskuto

EKC organizas en Tuluzo ekde 1993, kunage kun la kultura asocio Arnaud-Bernard, "Printempon de la lingvoj", kiu celas montri ke ĉiuj lingvoj en la mondo estas egalaj, por tiel kontraŭagi rasismen.

Kadre de Lingvo-Forumo (7 junio), la kvaran fojon okazis sur la Tuluza ĉefplaco Capitole — meze de arbaro da standoj, ĉiu dediĉita al sia lingvo — "pintrenkontiĝo" inter Félix Castan (poeto aparte ŝatata en Tuluzo) kaj Henri Meschonnic (franca sociolingvisto). Ĉi-foje, kiel tria kundiskutanto, aliĝis esperantisto: d-rino Ilona Koutny (Hungario/Pollando).

Tuj komence de la debato Koutny devis aŭdi de Meschonnic: lingvo en kiu eblas diri nur "donu al mi la salon" ne interesas lin! Tia sinteno provokis foje pasiajn reagojn de la publiko. Sed Ilona, ĉiufoje kiam ŝi havis okazon, klopodis multe pli subtile montri ke la tuta literatura kaj scienca produktado Esperanta estas plenrajta parto de formiĝanta mondkulturo, kaj do ĝi ne povas foresti el la debato de tiu forumo. La parollerto de Ilona, bonhumora kaj subtila, ŝajne efikis, ĉar post la publika debato Meschonnic agnoskis ke li scias tre malmulte pri la internacia lingvo, kaj ke li intencas korekti tiun mankon, ĉefe ĉe sia universitata kolego, esperantisto Emmanuel Company.

La kvar-tablan E-standon aliradis grandnombra, interesita publiko. Allogis ilin ĉefe la voĉ-sintezita programo pruntita de Ilona: komputilo parolis Esperante! Trideko da personoj lasis sian adreson, invitotaj al kunveno.

jmc

IFEF festis en Danio

Internacia Fervojista E-Federacio (IFEF) jubileis per sia 50-a kongreso (16-22 majo) en la dana urbo Aalborg.

El 21 landoj 263 partoprenantoj ĉeestis la kongreson. La solenan inaŭguron partoprenis reprezentantoj de ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj, kiuj salutis kaj bonvenigis la kongreson preskaŭ ĉiuj en Esperanto. La prezidanto de Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj (FISAIC), Gilbert Schmit, transdonis ormedalon de FISAIC al Per Engen pro lia multjara FISAIC- kaj IFEF-agado.

Post la inaŭguro la partoprenantoj sub la gvido de la vicurbestro plantis kverk-arbon en parko apud la kongresejo. La urbestro akceptis ĉiujn kongresanojn en la kunvenosalono de la urbestro.

La komitatanoj de IFEF elektis novan estraron: d-ro Romano Bolognesi (Italio) fariĝis prezidanto, István Gulyás (Hungario) restis vicprezidanto, Ernst Quietensky (Aŭstrio) iĝis sekretario, Henning Hauge (Danio) restis kasisto, Jean Ripoché (Francio) de nun redaktas *Internacia Fervojisto*.

La nova prezidanto transdonis al Per Engen nomumon al honor-prezidanteco, kaj al Erna Hauge (baldaŭ poste forpasinta, vd. p. 184) la distingon "Honora membro de IFEF".

Laborplano laŭ Kampanjo 2000

La komitato akceptis trijaran laborplanon de IFEF laŭ la linioj de Kam-

panjo 2000 de UEA kaj decidis pri venontaj kongresoj: en 1999 en Le Mans (Francio, 8-15 majo); por la jaro 2000 kandidatigas Budapeŝto.

Kadre de la terminara laboro la partoprenantoj ekzamenis kaj korektis la tradukojn de la novaj esprimoj kaj ties difinoj. La Fake Aplika Sekcio de la Komisiono pritraktis la fakan programon de la sekva IFEF-kongreso kaj de la faka kunsido dum la Montpeliera UK. La Sekcio eldonis novan numeron de *Fervojfakaj Kajeroj*.

La ĉefa faka prelego pritraktis la firman kunligon inter Kopenhago kaj Malmö trans la markolon Sundo. La aliaj dek prelegetoj temis i.a. pri la historio de la terminara laboro ĉe IFEF, la Kopenhaga metroo, nova duetaĝa Intercity-trajno naveta, incendio en la Manika Tunelo kaj la mondeskpozicio 2000 en Hanovro.

Laŭdindas la laboro de la eta LKK, sub prezido de Henning Hauge.

István Gulyás

Vicprezidanto de IFEF

En la jaro MCMXCVIII

Internaciaj E-Konferencoj de OSIEK (ĉi-jare: 18-24 julio, Triesto, Italio) estas aranĝoj laŭnombre modestaj, sed intelekto altkvalitaj.

Mi aliĝis al la konferenco de OSIEK kun agrablaj memoroj pri la pasintjara en Rafina, Greklando (vd. nov. '97, p. 188), kie mi spertis kun plezuro kompetentajn prelegojn de pluraj figuroj al mi ne konitaj. Ankaŭ la ĉi-jaraj prelegantoj ne seniluziigis min.

Enkondukon al "Internacia E-Konferenco MCMXCVIII" (temo: "Romiaj influoj kaj la latina lingvo en la mondkulturo") prezentis vicurbestro de Triesto, prof. Roberto Damiani. Por la pli ol 40 partoprenantoj el 14 landoj li kalejdoskope pentris la historion de sia urbo, kun tradicioj prahistoria, romia, Habsburga kaj slava.

Dum la postaj tagoj ni aŭdis ok prelegojn en Esperanto. Sub la titolo "Kiu estas la patro de Eŭropo?" Vinko Ošlak (Aŭstrio) ĉerpis — helpe de Theodor Haecker (1870-1945) — el la verkaro de Vergilio por montri ke tiu poeto-historiisto iel sternis la fundamenton de nia kontinento. Maria Butan (Rumanio) montris en "Banato — ujo de vort-latinidaĵoj" ke tiu regi-

ono estis la unua konkerita de la romianoj — kaj la lasta forlasita. Věra Barandovská-Frank (Germanio) sur-



D-rino Věra Barandovská-Frank

prizis nin per impona prezento de modernaj aŭtoroj kiuj kuraĝas — kaj kapablas — verki latinlingve. (Eĉ ekzistas movado komparebla kun la Es-

peranta: kongresoj, revuoj, ekskursoj ktp en la latina.) Ján Göldrich (Slovakio) parolis pri "Romia juro kaj formiĝo de la moderna civitaneco".

Per vidbendoj Günther Becker prezentis la tre diversajn sonojn hodiaŭajn de lingvoj kiuj evoluis el la latina. La prelegon "Ilroj plilongigis la vivon de la Romia imperio" fulmrapide liveris Bardhyl Selimi (Albanio). Aŭtentikan lecionon pri la latina poezio (en kiu gravas ne nur ritmo sed ankaŭ tonalto) brile donis al ni Bruno Masala, kaj Eŭgeno de Zilah digne finis la prelegoserion per "La diino Roma kaj la koncepto de naciŝtato".

La 24-an de julio okazis ĝenerala asembleo, en kiu ni demokrate elektis el kvin kandidatoj Claude Piron al ricevo de la OSIEK-premio 1998, pro lia de longe konata libro *La bona lingvo*. Honora diplomo iris al Maria Becker-Meisberger pro ŝia libro *Internacie kuiri*, jam trian jaron alveninta ĝis la fina balotado.

Poste la konferenco decidis okazigi la du sekvajn IEK en Metz (Francio) kaj Motovun (Istrio). La unua, pri "Mono kaj civilizo", okazos de 17 ĝis 23 julio 1999; informas Eric Laubacher (1 rue des Vosges, FR-78100 Montigny-le-Bretonneux; ericl@iname.com, <http://osiek.org/>).

Johano Rapley (Britio/Francio)

Pontoj en la lernejo

Partoprenantoj de la ILEI-konferenco ne nur teoriumis pri multkolorco kaj pri kunagado.

"Interkultura edukado" estis la ŝlosila vorto de la ILEI-aranĝoj dum kaj post la Montpellier UK.

Post bonvenigo fare de Atilio Orellana, direktoro de Internacia E-Instituto (vd. feb., p. 32), sep instruistoj prelegis lige al "Lingvo-instruado: ponto al la mondo" en la kongresa Tago de la Lernejo.

Kiel jam tradicie, Daniel Moirand (Francio) prezentis la kongreslandan edukistemon. Mireille Grosjean (Svislando) klarigis kiel diferencoj kulturaj kaj lingvaj en ŝia lando vekas antaŭjuĝojn; lernejoj interŝanĝoj povas helpi dispeli tiujn sentojn. Prof. Ron Glossop (Usono) pensigis pri la lingvaj bezonoj de la 21-a jc. kaj avertis ke ĝuste nun necesas instigi registarojn serioze pri-trakti la situacion. D-ro Mauro La Torre (Italio) klarigis la neceson interkonsenti pri "instruikaj" terminoj en E-o. D-rino Ilona Koutny (Hungario/Pollando), ĉefa aŭtoro de hungara-Esperanta vortaro, parolis pri uzo kaj preparo de diversspecaj vortaroj. La nova, altkvalita televida kursaro interkultura, *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*, estis prezentita de la scenaristo Paul Gubbins (Britio): jam 5 el ĝiaj 15 lecionoj haveblas kun ekzercaro de Stefan MacGill. Malfermante perspektivon al valora interlerneja kunlaborado eŭropa, Hans Erasmus (Nederlando) prezentis la projekton NEIGHBOUR (vd. apr., p. 69), apogatan de Konsilio de Eŭropo, kiu okazos sub kontrolo de la interlingvistika katedro de Universitato de Amsterdamo.

La Tago de la Lernejo proponis temojn por plua pritrakto dum la simpozio pri lingvopolitiko kaj interkultura edukado (vd. p. 171).

Interlernejoj projektoj

La 32-a konferenco de ILEI (8-14 aŭg.) okazis en Montpelliera katolika seminario; aliĝis 64 aliĝintoj el 24 landoj. La konferencetemon, "Lingvo-lernado, ponto inter kulturoj", pritraktis Mireille Grosjean. La kontribuoj rilatis i.a. al interlernejoj projektoj (Mauro La Torre), ILEI/UEA-ekzamenoj (Hans ten Hagen), metodo Freinet (Carla de Lorenzi), servoj al instruistoj (Marija Belošević), proponoj por E-instruado fare de instruistoj sen kono de dua lingvo (Jennifer Bishop), socia kaj psikologia evoluo de la rilato inter gelernantoj kaj geinstruistoj fine de la 20-a jc. (Ghislaine Tilleux-Craenhals), Universitato de la Tria Aĝo (Lawrence Mee), Urso-kurso (Malcolm Jones), uzo de vortaroj dum instruado kaj interlingvistikaj studoj (Ilona Koutny).

vas sekciojn en 25 landoj, ĉar, pro siaj lastjara agado kaj evoluo, Irano kaj Pollando estis unuanime promociitaj el la kategorio "reprezentantoj".

Okazis la estraraj elektoj por la periodo 1998-2000. La elektitoj: Mauro La Torre (prezidanto), Stefan MacGill (vicprezidanto), Atilio Orellana (sekretario), Jennifer Bishop (vicsekretario), Bertil Andréasson (kasisto), Carla de Lorenzi, Antonio Leoni (membroj). El la antaŭa ILEI-estraro restas do nur Orellana kaj Andréasson.

La sekva ILEI-konferenco (Karlovy Vary, Ĉeĥio, 7-13 aŭg. 1999) traktos la temon "Edukado al la paco". Leviĝis la ideo okazigi ILEI-gimnazion kadre de UK. Por la 34-a Konferenco en la jaro 2000 oni jam preparas la elekton de konferenca urbo en Israelo.

Laŭ raportoj de Jennifer Bishop kaj Atilio Orellana

Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA

En la Montpellier UK al la ekzamenoj aliĝis 10 kandidatoj por la elementa nivelo kaj 13 por la meza nivelo. **Element-nivelo** sukcesis la jenaj 6 personoj: Pierre Charrière el Francio, Katarina Eckstädt el Germanio, Marie-José Lerouge el Francio, Tatjana Malej el Rusio, Hanitra Ralambo-mihoatra el Malagasio kaj Rodrigo Ramírez Zuluaga el Kolombio. **Por la meza ekzameno** sukcesis jenaj 12 kandidatoj: Ismael Ávila el Brazilo, Jean-Paul Angevin el Francio, Maria Butan el Rumanio, Andreas Emmerich el Germanio, Zoja Kačalova kaj Ljubovj Malej el Rusio, Andreo Marshall el Britio, Ramon Perera el Hispanio, Jacques Poiteau el Francio, Justine Ralalarisoa el Malagasio, Antônio de Ruyter el Nederlando kaj Tatiana Vtorova el Rusio. Gratulon al ĉiuj sukcesintoj!

Hans ten Hagen, sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono

Noto: En la Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj (vd. p. 182) sukcesis elemente Walter Wagner (Aŭstrio) kaj Fabrice Morendeau (Francio); meznivelan ekzamenon superis Laura Gentili (Italio).

La interesa "nenatureco"

La esperantologia konferenco en Montpeliero fokusiĝis al la reciprokaj atendoj kaj profitoj de lingvistoj kaj la E-movado.

La fakuloj kaj la movado; la movado kaj la fakuloj": jen la pensokadro de kvarhora programo, kie prelegis Natalia Dankova, Mauro La Torre, Humphrey Tonkin kaj Marc van Oostendorp (konferenca kunordiganto).

Van Oostendorp (estro de la interlingvistika katedro en Universitato de Amsterdamo) montris kial Esperanto aparte interresu lingvistojn, eĉ pli ol aliaj lingvoj: malgraŭ ke ne ekzistas bonaj sinkronaj kialoj nomi E-on "nenatura", la diskuto pri "natureco" povas ĝuste utili al ĝia esplorado. Eblas ja konsideri ke Esperanto estas lingvo "natura" funkcia en cirkonstancoj iom "nenaturaj" (t.e. nekutimaj por aliaj lingvoj); aliflanke Esperanto estas "nenatura" (inventita, juna) lingvo kiu tamen funkcias bone ankaŭ en "naturaj" cirkonstancoj.

Observante Esperanton en praktika uzo, d-rino Natalia Dankova (Parizo) esploras kiel oni akiradas duan lingvon. Tial ke la normoj de E-o ne estas

tro rigidaj, ĝi donas pli klarajn ekzemplojn pri "transdono de naciismoj", fenomeno kiun traktis ŝia doktoriga disertaĵo, "Temporilatoj en Esperanto".



Prof. Marc van Oostendorp kaj d-rino Natalia Dankova

Amplekse prikomentis ĉi tiujn du prelegojn d-ro Carlo Minnaja. Laŭ li tre gravas ke la movado estu kiel eble plej malfermita al fakuloj, eĉ se oni ne povas atendi de ili ian subtenon al niaj idealoj. Laŭ invito de Minnaja, Christer Kiselman prezentis siajn planojn pri nova scienca periodaĵo du-lingva, *Esperantologio / Esperanto*

Studies, kiu aperos surpapere kaj/aŭ en Interreto. La redakta komitato konsistas (ĝis nun) el Detlev Blanke, Probal Dašgupto, Edmund Grimley Evans, Ilona Koutny, Jouko Lindstedt, Geraldo Mattos, Sergio Pokrovskij kaj YAMASAKI Seikō.

En la dua parto temis pri la alia flanko de la medalo: "kion la movado bezonas de la fakuloj". Mauro La Torre klarigis ke necesas distingi inter la movado kaj la lingvokomunumo. La lasta certe bezonas fakulojn kiel ĉiu komunumo: por fari lernolibrojn, vortarojn, gramatikojn k.s. (La Torre emfazis tamen ke se ekz. matematikistoj verkas artikolojn kaj librojn en kiuj ili uzas la lingvon, tio estas eĉ pli utila ol nur kompili vortolistojn, kun vortoj eble neniam vere uzataj/-otaj.) Cetere ankaŭ la (ideologia) movado bezonas siajn fakulojn por pli profesie propagandi ktp.

La lasta parolanto estis Humphrey Tonkin. Iom resumante la aliajn prelegojn, li denove emfazis ke estus tre grava afero se pli da "eksteraj" fakuloj prenu serioze Esperanton kaj ĝian movadon/komunumon kiel lingvan fenomenon respektive kiel fenomenon socian. Fakuloj ofte interesiĝas pri tute aliaj flankoj de la lingvo kaj de la movado ol la estoj — sed tio ne estu tro grava baro. *Laŭ raporto de Marc van Oostendorp*

INTERVJUO

Mattos: "Reciproke konfronti opiniojn"

Kiel vi vidas la rolon de la lingva instanco kiun vi ekgvidas?

La Akademio apartenas al ĉiuj: ĝi devas havi utilon por ĉiuj uzantoj de la lingvo, ankaŭ kiel iaspeca lingva konsultejo.

Kiel efektiviĝos konstanta kon-takto kun la "popolo"? Ja ne plu aperas La letero de l'Akademio.

Mia intenco estas ke la lingvaj materialoj de la Akademio estu disponeblaj pere de — ni diru — "Lingvaj cirkuleroj" aboneblaj. Laŭ la planoj la Akademio baldaŭ havos ankaŭ sian TTT-paĝon, plej verŝajne ĉe mia universitato en Brazilo.

Laŭ via sperto, kia etoso regas en la Akademio?

La interpersonaj rilatoj ŝajnas tre bonaj. Se mi bone nombris, 22 membroj de la Akademio ĉeestis ĉi tiun kongreson, kio ebligis al mi konatiĝi aŭ denove renkontiĝi kun multaj el miaj



Geraldo Mattos intervjuata. Sube: salutante la kongresanojn.

kolegoj. La bonan etoson de kunlaboremo instigas ankaŭ la fakto ke jam 30 akademianoj estas atingeblaj per retroŝto.

Sed la diversaj anoj reprezentas tre diversajn konceptojn pri nia lingvo. Ĉu tio ne blokas la laborojn?

La Akademio estas forumo malferma por diskuti ĉiujn klerajn opiniojn. Ĉiu el ni ja ŝuldas al si mem reciproke konfronti siajn vidpunktojn kun aliaj opinioj: nur tiel nia propra pensado restos fleksebla.



Furoraĵoj de la Kongresa Libroservo '98

La Kongresa Libroservo en Montpeliero havis same imponajn dimensiojn kiel la UK mem. La fina vendosumo de ĝiaj varoj superis 120 mil guldenojn.

• **Horizonto bezonata**

Ne plu bezonatajn numerojn de la revuo *Horizonto*, ĉefredaktita (1981-1987) de prof. d-ro Ivo Lapenna, sendu al Fondaĵo kaj Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna (Grøndalsvej 30, DK-2000 København, Danio), laŭ peto de Birthe Lapenna (lapenna@cybernet.dk). Samadrese bonvenas monkontriboj por la laboro de tiuj ĉi institucioj, kiuj ĉeftaske disvastigas la ideojn de Ivo Lapenna.

• **Ziraldo ree tradukota**

Post la Esperanta eldono — ĉe la fama brazila eldonejo Melhoramentos — de *La knabo frenezeta* (jul.-aŭg., p. 139), sukcesega desegna rakonto de Ziraldo, la sama aŭtoro jam donis rajton por E-traduko de alia porinfana libro lia, *Flict*, por ebla lanĉo ĉe la sama eldonejo venontjare. (*Brazila Esperantisto*)

• **Memorlibro en Budapeŝto**


Zorge de la katedro pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko de Universitato ELTE (Budapeŝto), al kiu apartenas la Esperanto-fako, aperis memorlibro (494p.) kun la prelegoj de la internacia konferenco organizita en 1997 por la 30-jariĝo de la fako. (B. Wacha)

• **Foliumi sen papero**

Berlina Informilo: <http://www.Esperanto.de/org/lv.berlin/informilo/>. *Esperanto sub la Suda Kruco*: <http://www.geocities.com/Athens/Olympus/6878/035/>. *Sennaciulo, Sennacieca Revuo*: <http://www.worldnet.net/~sat-esp/Sulo.html/>. *Slovaka Esperantisto*: www.esperantisto.sk/.

• **Kelklinie**

Novaj redaktoroj: Jean Ripoché (*Internacia Fervojisto*), Ziko M. Sikosek (esperantlingva eldono de *Esperanto aktuell*)... *Juna Amiko* havas nun kolorajn kovrilpaĝojn... Ĉesis aperi la revuoj *Esperantigita Poezio* kaj *Geja Viro*... Aperis la dua numero de *Jura Tribuno Internacia*, organo de Esperanta Jura Asocio (redaktas J.M. Rodríguez Hernández, joser@lander.es).



De maldekstre: Clay Magalhães, Cristina de' Giorgi, Michela Lipari kaj Pasquale Zapelli fermas la kason de la kongresa libroservo en Montpeliero.

	TITOLO	VENDOJ	PREZO (GLD.)
1.	<i>Internacia Kongresa Universitato '98</i>	176	12,00
2.	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> (gvidilo)	100	6,60
3.	<i>Ili vivis sur la tero, Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo*</i> , M. kaj B. Robineau	93	45,00
4.	<i>Monumente pri Esperanto</i> , H. Röllinger	73	18,00
5.	<i>Kio ni estas kaj kion ni celas</i> (komentoj pri la Praga Manifesto)	64	4,80
6.	<i>Parlons Espéranto*</i> , J. Juguin (franca lernolibro)	57	55,50
7.	<i>Kelkaj paŝoj en la okcitana</i> , P. Averós kaj I. Bachimont	56	10,50
8-9.	<i>Dictionnaire de poche / Poŝvortaro</i> (franca-Esp.-franca)	50	12,00
	<i>Mini-guide Esperanto</i> (enkonduko por francalingvanoj)	50	6,00
10.	<i>Jacques Yvart kantas Georges Brassens*</i> (kompaktdisko)	49	33,00
11.	<i>Terminologia gvidilo</i> , H. Suonuuti	47	12,00
12.	<i>Esperanto post la jaro 2000</i> , A. Korjenkov (eseo)	39	4,80
13.	<i>Al lingva demokratio</i> , red. M. Fettes kaj S. Bolduc (Aktoj de la Nitobe-Simpozio)	38	22,50
14.	<i>Pajleroj kaj stoploj</i> , W. Auld (elektitaj prozaĵoj)	36	42,00
15.	<i>Pasporta Servo</i> (listo de gastigantoj)	35	24,00
16-17.	<i>Saluton!</i> , Esperanto aŭtodidakte, A. Childs-Mee	32	24,00
	<i>Zamenhof kaj judismo</i> , A. Cherpillod	32	18,00
18.	<i>Ne tiel, sed tiel ĉi!</i> , Konsilaro pri stilo, F. Faulhaber	30	6,00
19.	<i>Faktoj kaj fantazioj*</i> , M. Boulton (legolibro)	29	36,00
20-21.	<i>Ŝtupo post ŝtupo</i> , Praktika konsilaro, J. Baksa	27	10,50
	<i>Vastas la mondo, multas laboro</i> , Kim Woo-Choong	27	18,00

*venditaj rabate

Laste aperis



Amora vortareto. Stanisław Świsłak (Marmoto, 1941-98). Krakovo: la aŭtoro, 1998. 51p. 21cm. Milo da kapvorto ne sen-escepte decaj, kun difinoj ne ĉiam seriozaj. 15,00 gld.

Antologio de la serba poezio (1200-2000). Ĉefred. Srdj Arandjelović (1920-96). Red. Zlatoje Martinov, Greta Stoll, Nedeljka Subotić, Marko Petrović. El la serba trad. 25 diversaj. Beograd: Serbia E-Ligo, 1998. 499p. ISBN 86 901281 3 1. 25cm. Bind. Reprezenta elekto el la poezio de popolo en kies historio versoj ĉiam estis viviga forto. Kun biografioj de la aŭtoroj. 60,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Disertacio pri la maniero feki. Legita en franca akademio en 1743. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1998. 32p. ISBN 2 906134 46 5. 21cm. 10,50 gld.

Dječiji rječnik. Mustafa Tandır. Mostar: Islamski Centar, 1997. 86p. ISBN 9958 804 01 8. 21cm. Porinfana vortaro bosna-araba-angla-Esperanta kaj araba-bosna-angla-Esperanta, alfabeto kaj laŭ temoj. 13,80 gld.

Durankulak. Sabira Ståhlberg (1969). Varna: Bambu, 1998. 78p. ISBN 954 9637 02 6. 20cm. Romaneto: Mondofinan urbeton orient-eŭropan, "sur la limo inter realo kaj sonĝo", vizitas japano kun sekreta misio. 19,20 gld.

Ekzercoj "Hanako lernas Esperanton". Jokohama: Mevo-Libro, 1997. 101+15p. 21cm. Kompletigo al internacie uzebila lernolibro. 9,60 gld.

Et leur vie, c'est la terre. Huit ans de nomadisme autour du monde. Maryvonne et Bruno Robineau (1957, 1954). Nantes: Opera, 1996 (2-a eld.). 277+8p. ISBN 2 908068 43 5. 24cm. Kun koloraj fotoj. Francilingva. Vd. ĉe *Ili vivis sur la tero*. 45,00 gld.

Eŭropa ideologio. Zlatko Tišljar (1945). Maribor: Inter-kulturo, 1998. 68p. ISBN 961 6075 19 5. 17cm. Pensoj pri eŭropaj konscio kaj identeco. 13,20 gld.

Eŭropa kalendaro. Fasti Europenses 1999-2000. Red. Věra Barandovská-Frank. Paderborn: Eŭropa Klubo, 1998. 106p. ISBN 3 929853 05 1. 30cm. Ilus. Anna Formaggio. Kun unu nova vorto ĉiutage en 15 lingvoj. Informoj pri Eŭropa Unio kaj ĝiaj membrolandoj Esperante, latine kaj en la koncerna nacia lingvo. 18,00 gld.

Eŭropo parolas 100-lange / Europa spricht mit 100 Zungen. Pri la problemaro de etnaj minoritatoj. Uwe J. Moritz (1939). Osnabrück: Deutsches E-Institut, 1997. 44p. 21cm. Dulingva: E-germana. 9,00 gld.

Historieto de Esperanto. Ludovikito (Itó Kanzi, 1918). Tokio: Libroteko, 1998. 467p. ISBN 4 947728 19 1. 21cm. Monografio pri la komencaj periodoj rusa kaj franca: 1887-1903. 78,00 gld.

Ili vivis sur la tero. Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo. Maryvonne kaj Bruno Robineau. El la franca trad. Lucien Bourgois, Fernand Boyet, Marcel Ternant. Nantes: Opera, 1998. 243+8p. ISBN 2 908068 96 6. 24cm. Koloraj fotoj. Vojaĝantoj enigardas multlande en la ĉiutagan vivon, plejparte dank' al Esperanto. (Vd. majo, p. 82.) 45,00 gld.

Ilustritaj gravaj eventoj en la vivo de Konfuceo. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1998. 4+83p. ISBN 7 5052 0369 X. 26x18cm. 83 bildoj kun lakona teksto. Kvazaŭ helpilo por kompreni la Konfucean pensaron. 21,00 gld.



Kadre de Kampanjo 2000, la 10-jariĝanta EUROKKA — faka asocio de TEJO — eldonas Kolekton 2000 (vd. majo, p. 97): jen la unuaj du diskoj.

Internacia Lingvo Esperanto / Esperanto Halqaro Tili. Gramatiko, E-uzbeka-E vortaroj, uzbeka-E konversacilibro. Anatolij Ionesov, Bahodir Habibov. Samarkand/Moskvo: Impeto, 1998. 231p. ISBN 5 7161 0052 X. 20cm. La unua lernilo por uzbeklingvanoj. 24,00 gld.

Jen, denove. . . Mikaelo Bronštejn (1949). Moskvo: Impeto, 1998. 119p. ISBN 5 7161 0050 3. 17cm. Ilus. Vjaĉeslav Te. Kantoj, poemoj originalaj kaj tradukaj, du rakontoj. 12,00 gld.

Kio ni estas kaj kion ni celas. Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto. Roterdamo: UEA, 1998. 15p. 30cm. Provizora eld. Sep fakuloj esee komentas la sep punktojn de la Manifesto. 4,80 gld. Triona rabato ekde tri ekz.

Legendoj pri SEJM. Mikaelo Bronštejn. Moskvo: Impeto, 1998 (2-a, kompletigita eld.). 111p. ISBN 5 7161 0049 X. 20cm. Ilus. Nikolaj Beloborodov. Ofte absurdaj, sed veraj okazaĵoj el la historio de Sovetia Esperantista Junulara Movado. 12,00 gld.



Kun viaj kontribuajoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj estas aparte bonvenaj. Koran dankon!

Lingua e Unione Europea. Il rapporto biunivoco lingua-politica e il problema della comunicazione internazionale. Andrea Chiti-Batelli. Manduria: Lacaita, 1998. 24p. 21cm. Itallingva. Pri la rilato inter lingvo kaj politiko. 6,00 gld.

Nenio fremda por mi fremdas. Aforismoj. Veselin Georgiev (1935). El la rusa trad. Jan Iodis, Galina Staneŝnikova. Moskvo: RAM, 1998. 102p. 16cm. Ilus. Saĝaj kaj humuraj frazoj de bulgara aŭtoro esperantista, verkanta ankaŭ ruse. 12,00 gld.

Sodot. Kaŝitaj mesaĝoj en la Biblio (1996). Hans-Holger Lorenzsonn. El la sveda trad. Gunnar Jeremi Gishron. Munkfors: la aŭtoro, 1997. 50p. ISBN 91 972927 8 8. 21cm. Pri serĉado de kodoj en la Biblio. 9,90 gld.

Sur Parnaso. Timothy Brian Carr (1943). Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1998. 119p. ISBN 90 71205 73 8. 21cm. Poemaro ĉefe soneta de poeto kun "vigle vivoza etoso kaj lingvaj beltrovaĵoj" (W. Auld), pri amo, Esperantujo, futbalo, poezio, politiko ks. 28,50 gld.



Terminologia gvidilo (1997). Heidi Suonuuti. Red. Wera Blanke. El la angla trad. Sabine Fiedler. Rotterdam: UEA, 1998. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3. 21cm. Kompakta enkonduko al la principoj kaj metodoj de praktika terminologia laboro. 12,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Tri rakontoj pri la Miljara Paco. John Francis (1924). Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1997. 117p. ISBN 90 71205 66 5. 21cm. Fikciaj historioj pri la imperio Juglando kaj ĝiaj najbarlandoj, medio konata el la novelaro *Vitrilo* (1960) de la skota kvaropano. 27,00 gld.

Varsovio 1887 / Zamenhof ŭi il seng (1986). Anastasio López Luna (1914-95). En la korean trad. LEE Jung-kee. Seulo: Doksu, 1994. 207p. 23cm. Dulingva (korea-E). Romanigitaj viv-epizodoj de Zamenhof. 12,00 gld.

Základy Esperanta. Baza lernolibro de E-o. Eduard V. Tvarožek (1920). Bratislava: Esprima, 1994 (3-a, pliampleksigita eld.). 80p. 21cm. Por slovakingvanoj. 9,00 gld.

KARTOJ

Gratulkarto “Malfermaj pordoj”. Kun la vortoj “Korajn bondezirojn” en 6 lingvoj. Po dek kartoj: 13,50 gld.

Kvizkartaro: Nivelo 1. 130 kartoj. Bazita sur la E-lingva libro *Look Sharp — Generalaj scioj* de Stefan MacGill. Skipton: Esperanto Teachers' Association, 1998. Paroliga kaj distra lud-kartaro. 28,50 gld.

Kvizkartaro: Nivelo 2. 130 kartoj. Vd. ĉi-supre.

KOMPAKTDISKOJ

Jacques Yvart kantas Georges Brassens. Kolekto 2000. Donneville: Eurokka, 1998. 20 min. Trad. R. Bernard, G. Lagrange, B. Legeay, C. Piron, M. Redoulez. Ses kanzonoj de fama franca poeto-kantisto. 33,00 gld.

JoMo kaj Liberecanoj. Kolekto 2000. Donneville: Eurokka, 1998. 21 min. Impeta rokenrolo: ok liberecanaj kantoj. 33,00 gld.

SONKASEDOJ

Juliano kantas. Julián Angulo Hernández (1953). Havano: Heliko (Kuba E-Asocio), 1997. 60 min. 17 kantoj, plejparte originale verkitaj en Esperanto. Prezentas Maritza Gutiérrez. 19,80 gld.

Latinamerika mozaiko. Havano: Heliko, 1997. Muzikas Héctor Jiménez. Prezentas Maritza Gutiérrez. Reĝisoris Julián Hernández. 57 min. 19,80 gld.

Sub la Napola suno. Amitinero tra la Napola kanzono. Gitaro kaj voĉo de Valerio Mottola. El la napola trad. Nicolino Rossi. Napoli: Intel Soft, 1998. 33 min. 11 kanzonoj. 27,00 gld.

Unuaj paŝoj. Valentina (Valentina Maria Nan, 1959). Baia Mare: la aŭtoro, 1998. 17 originalaj kanzonoj de kantistino el Rumanio. 58 min. 19,80 gld.

Urso-Kurso: Kantkolekto. Prezentita de Stephen Thompson. Skipton: Esperanto Teachers' Association, 1998. 18 lernigaj kantoj akompane al la samnoma kurso. 25,50 gld.

VIDBENDOJ

Kompreni kanguruon. *Aŭstralio — la lando de la 82.* UK. Roman Dobrzyński (1937). Varsovio: la aŭtoro, 1998. 63 min. PAL. Prezentado de la kongreso kaj de ĝia sud-hemisfera fono. 60,00 gld.

La muzikskatoloj. 200-jara historio. Francisko Randin (1951). Lingve konsilis Claude Piron. Realige asistis Pascal Gander. Lausanne: Filmoj Nandir, 1998. 30 min. NTSC aŭ PAL. Dokumentaĵo pri malnova svisa metio. 66,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insigno k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

TERMINOLOGIO

Sur la spuroj de Wüster

Kunorganizinto, kontribuinto Detlev Blanke raportas pri la Viena konferenco ProCom '98, honore al Eugen Wüster.

Unu (kaj ne la sola) rezulto de Terminologia E-Centro de UEA estas la plifortigantaj rilatoj, ligitaj meze de la 80-aj jaroj, inter UEA kaj la terminologiaj medioj. Tial — verŝajne unuafoje — Esperanto estis bone reprezentata en prestiĝa konferenco terminologi-sciencia, kie ĝiaj fakuloj aktivis plene akceptite inter 120 partoprenantoj el 26 landoj, i.a. multaj renomaj terminologoj.

Sub la kadra temo “Faka komunikado kaj scio-transdono”, de 24 ĝis 26 aŭg. “duobla” konferenco omaĝis en Vieno, ĉe Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB), al Eugen Wüster (1898-1977), naskita antaŭ cent jaroj. Temis pri la konferencoj “Faka komunikado, terminologio kaj planlingvoj” (Wüster-konferenco) kaj “Terminologia laboro kaj scio-transdono”, 4-a simpozio de INFOTERM (Internacia Terminologia Informcentro, fondita de Wüster).



Al la organiza komitato apartenis la direktoro de Internacia E-Muzeo Vieno (IEMW), Herbert Mayer, kaj al la programkomitato Detlev Blanke.

Gvidiloj en termin-arbaro

Projekto komencita en 1981 de manpleno da E-lingvaj forstistoj intertempe kreskis al internacia reto de pli ol 100 kunlaborantoj.

Kiam Internacia Forstista Rondo E-lingva (IFRE) en 1992 prezentis prov-volumon de sia *Lexicon Silvestre* al la 100-jariĝa jubilea kongreso de Internacia Unio de Forstesploraj Organizoj (IUFRO), ĉiuj amikoj de tiu diligenta kaj persistema kolektivo esperis ke iel aperos la sumo necesa por publikigi la verkegon, kiun kompetentaj entuziasmoj ellaboris senpage, sub ofte senesperigaj kondiĉoj.

La projekto, komencita en 1981 de eta manpleno da E-lingvaj forstistoj, kreis transliman reton de pli ol 100 kunlaborantoj, en kiu la internacilingvuloj minoritatas. Esperanto, unue ĉefa celo de la entrepreno, restis “nur” laborlingvo kaj bazo por akordigi la difinojn. Malgraŭ ĉiuj obstakloj, la relative modesta ideo krei arbarfakan terminaron E-lingvan evoluis al vere unika, senprecedenca plano:



D-ro Karl-Hermann Simon kun la forstofaka verkego

El la kompleksa forstfaka nocio estu prilaborataj la 6 000 plej necesaj nocioj. Pro la multaj nomoj por iuj objektoj en unuopaj lingvoj, tio povas signifi: ĝis 30 000 fakvortoj. La difinoj estu ellaborataj Esperante kaj akorde transigitaj al laŭeble multaj




Eugen Wüster

En komuna malferma ceremonio ses prelegoj prezentis (ĉiuj angle) facetojn de la vivo kaj verko de Wüster. I.a. Detlev Blanke traktis la rilatojn inter

terminologio-scienco kaj planlingvoj en la Wüster-verkaro, kaj Gerhard Budin la enkomputiligon (inkl. la planlingvaĵojn) de la Wüster-arkivo. Ĉi tiuj prelegoj jam aperis, kun i.a. kompleta bibliografio de la verkoj de la jubileulo (Helmut Felber), kiu enhavas la parton "Planlingvoj — Esperanto" kun 128 titoloj (el kiuj 82 en Esperanto).

En la Wüster-konferenco unu el la kvar sekcioj, organizita de D. Blanke, temis pri "Terminologio-scienco kaj planlingvoj". Prelegis tie Wera Blanke (organizado de terminologiaj E-aktivaĵoj), Otto Back (latinaj kaj grekaj propraj nomoj en *Enciklopedia Vortaro* de Wüster), Sabine Fiedler (Wüster kiel leksikografo), Heinz Hoffmann (ebloj de planlingvo ĉe inter-lingvaj nocio-diferencoj), Karl-Hermann Simon (*Lexicon silvestre* — vd. ĉi-sube), Wim de Smet (planto- kaj bestonomoj en E-o) kaj Herbert Mayer (la planlingva postlasaĵo de Wüster en ANB).



aliaj lingvoj. Ĉiu lingvo estu samranga, kaj la nombro de aldonaj versioj dependu nur de la diverslingvaj kapablaj kunlaborantoj. Ĉar unualoke oni celas kvaliton, temas kompreneble pri sistema ordigo, surbaze de la Pri-forsta Dekuma Klasifiko de IUFRO (1990).

La ambicia plano parte jam realiĝis. Helpe de subvencioj, donacoj, eĉ vend-enspezoj, la forstistoj mem eldonadas la verkegon po pecoj. Tiel aperis de 1995 11 volumetoj, kun 1000 forstfakaj nocioj en 9 lingvoj: angla, ĉeĥa, E-o, franca, germana, kroata, latva, rumana, turka. Uzanto povas elekti por sia bezono: unu volumo povas servi kiel forstfaka leksikono, du volumoj kiel tradukvortaro dudirekta, pluraj volumoj kiel plurlingva terminaro. Ĉar kunlabore interkonsentis ĉiuj nun aktivaj forstistoj e-istaj, la E-versio povas validi eĉ kiel ia normo.

Intertempe la lingvonombro kreskis al 26; kelkaj volumoj ekzistas jam en dua (unu eĉ tria) plibonigita eldono.

Jus aperis la Esperanta kaj germana versioj de la dua vorto-milo: *Lexicon Silvestre — secunda pars*. Gratulon al la ĉefaŭtoro, d-ro Karl-Hermann Simon, kaj al IFRE! Prepariĝas eldono de la bulgara, hispana kaj rusa versioj, la dua eldono de la pola, kaj la tria milo da vortoj en la germana. TTT-paĝo (germanlingva) troviĝas sub <http://www.fh-eberswalde.de/>.

Wera Blanke (Germanio)

Belega glumarko

kun la simbolo de nia sekva kongreso, la impona Brandenburga Pordego, aperis jam en la Montpeliera UK kaj furore vendiĝis. Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ

Berlino. Mendebla ĉe la Libroservo de UEA:

6 gld. po unu folio de 24. Triona rabato ekde 3 folioj.



De Smet prelegis Esperante, la aliaj germane. La tekstoj aperos en la kongresaktoj, ĉiu kun angla kaj E-resumo.

Estis tre ĝojige konstati ke ankaŭ diversaj prelegoj de neesperantistoj menciis la laboron de Wüster por/pri Esperanto kaj la influon de planlingvoj al lia scienca verko. Tion montris ankaŭ ekspozicio pri Wüster, organizita de IEMW kaj INFOTERM en ANB.

La konferenco certe ne montris aktivan intereson por pli forta utiligado de E-o kiel faklingvo, sed klare estimis la kontribuon de Wüster kaj volonte konatiĝis kun la nuntempa agado en tiu kampo. Kaj tio estas multo.

Detlev Blanke (Germanio)

UEA ĉe Internacia Organizo por Normigado (ISO)

UEA estas unu el la 37 internaciaj organizoj en oficiala kontakta statuso kun la Teknika Komitato TC 37, nomata "Terminologio (Principoj kaj kunordigo)", de Internacia Organizo por Normigado (ISO).

La rilatojn kun ISO flanke de UEA prizorgas Terminologia E-Centro, kiu laste pretigis *Esperantan eldonon de Terminologia gvidilo*. Ĝia aŭtorino, Heidi Suonuuti, multajn jarojn prezidis TC 37.

La 14-an de aŭgusto la Teknika Komitato TC 37 kunsidis en Stokholmo. Ĉeestis 30 membroj kaj 9 observantoj. Kiel observanto de UEA partoprenis Roland Lindblom. En la kunsido oni prezentis i.a. la programon "Multlingva Informasocio" de Unesko, kiu elstarigas la ekziston de ĉiaspecaj fakaj terminaroj kiel kondiĉon por la pluvivo de malgrandaj lingvoj.

Fake



• Blinduloj: “Nur kvarsense”

En la 64-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj en Artigues ĉe Bordojo (Francio) ĉ. 110 personoj el 13 landoj (i.a. multaj rusoj, eĉ el centra Azio) ĝuis riĉan programon, ekz. ekskurson al la naskiĝdomo de Théophile Cart. Sekve al diskutoj pri la kongresa temo “Nur kvarsense”, rezolucio admonis edukajn kaj rekapablajn instancojn atenti — krom modernajn helpilojn — la trejnadon por optimume utiligi la restantajn sensojn. (R. Moerbeek)

• Enciklopedio: 200 000 paĝoj

La deka volumo de la porinfana enciklopedio *Avanta+*, eldonata en 100 mikrozempleroj en Moskvo, temas pri lingvoj. En ĝi dupaĝa artikolo pri Esperanto estis verkita de Valentin Melnikov: laŭ Halina Gorecka temas pri “nepre la plej bona el ĉiuj enciklopediaĵoj, kiuj aperis en Ruslando kaj Sovetunio”. (*La Ondo de Esperanto*)

• Kulturo: Nova KEF-generacio

Unika manifestiĝejo por la originala E-kulturo, la sesa Kultura E-Festivalo de Sveda E-ista Junulara Unuiĝo (10-16 aŭg., Lesjöfors, Svedio) povis fieri pri rekorda partoprenantaro de 184 kultur-interesatoj, plejparte junaj. La komencaj tagoj de KEF-98 estis dediĉitaj al propra kreado en diversaj “uzinoj”: verkado, desegno, kanto, danco, ĵonglado k.a. Dum la finaj tri tagoj posttagmeze kaj vespere okazis prezentoj, plejparte muzikaj. Aŭdiĝis “veteranoj de KEF” kiel Ĵomart & Nataŝa kaj Persone, kaj nova generacio de KEF-artistoj: Ekvinokso, Massimo Manca kaj Rolf Fantom. (F. Luin)

• Lingvopolitiko: Ĉu EU havas?

“Ĉu EU havas lingvopolitikon?” Tiu-teme prelegis Wilmya Zimmermann, membro de Eŭropa Parlamento, la 22-an de junio en Erlangen. Ŝi petis pripenzi ke per Esperanto multaj nunaj malfacilaĵoj povus esti venkitaj. En la sekva diskuto, al kiu kontribuis e-istoj el la urboj Nürnberg, Erlangen kaj Forchheim, precipe la avantaĝoj de Eperanto estis substrekitaj. (E. Kruse)

• Literaturo: Rendevu’ en Mantu’

En literatura festivalo (12-13 sep., Mantuo, Italio) gastis nia korifeo William Auld. Interparolon kun li gvidis Giorgio Silfer, vicprezidanto de Esperanta PEN-Centro, kaj eblis lin plu demandadi en literatura kafejo (pompa muzea salono). Auld deklamis parteton el *La infana raso*, kiun LF-Koop aperigos kompaktdiske, kun muzika akompano. Omaĝe al la Akademio, festanta la 50-an datrevenon de sia postmilita restarigo, prezidinto Auld skizis la rolon de Zamenhof kaj de la Lingva Komitato en 1905-1948 por la evoluo kaj stabiliĝo de la lingvo. Carlo Minnaja, estro de la Literatura Sekcio, fervore prezentis la demandon “-ata/-ita”. Ilona Koutny traktis la gramatikan karakteron de radikoj, temon kiu iam konfliktigis István Szerdahelyi kun la Akademio. (I. Koutny)

Praga Manifesto

Ĝis redaktotino la nombro de subskriboj atingis **12 028**.

• Poezio: Publiketo en Pometo

Kunlabore kun la humanisma Fondaĵo Masereel (kiu eldonis en 1995 la nederlandlingvan libreton *Esperanto — een kritische kijk op de Internationale Taal* de Alberto Fernández), Flandra E-Ligo organizis la 19-an de septembro en Antverpeno poezian posttagmezon kun la titolo “Esperanto renkontas Flandrion”. Post enkonduko de Ludo Abicht, prezidanto de Fondaĵo Masereel, dekdudo da esperantistoj prezentis poemojn, ĉiu en sia propra lingvo, kun komento en la nederlanda, antaŭ 40-kapa publiko en la teatro Het Appeltje (“La Pometo”).

• Teatro: Dek jaroj da Espero

Seninterrompe jam la dekan jaron la Esperanto-teatro “Espero” de Jerzy Fornal prezentas ĉiumonate (en ĉiu unua lundo je 17.00; ☎ 629-24-41) siajn spektaklojn en Varsovio. En la repertuaro troviĝas 14 E-spektakloj kaj 1 pantomimo. La premiero de la nova sezono (ekde 7 sept.) estas monologaro el la verkoj de Sławomir Mrożek, Anton Čehov kaj Janusz Korczak. (Z. Banet-Fornalowa)

Komplaze de Ulrich Matthias



Montpeliero: 70 landoj

Ĉe la postkongresa enkomputiligo de la surlokaj aliĝoj dum la Montpeliera UK malkovriĝis ke la efektiva nombro de la reprezentitaj landoj estis pli granda ol anoncote. La 3133 aliĝintoj devenis el entute 70 landoj anstataŭ 66.

• Katolikismo: Elreviĝoj kaj sukcesoj en Taizé

Kadre de la 2-a Junulara Ekumena-Tendaro (9-16 aŭg.) unuafoje renkontiĝis internacia grupo de junaj esperantistoj en la vilaĝeto Taizé (sudorienta Francio), kie kunvenas ĉiusomere dekmiloj da ĝejnuloj el la tuta mondo. En la homamaso la 30-40 e-istoj el 9 landoj ne facile kolektiĝis. Nur venkinte komencan insiston de la organizantoj por apartiĝo — ĉiu laŭ sia nacio — ili sukcesis komenci esperantistajn diskutrondojn. Ofte ili havis okazon informi aliajn partoprenantojn pri Esperanto, kaj la reago ĉiam estis pozitiva, ĉar en Taizé ĉiu iel suferas pro la lingva kaoso. (U. Matthias)

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 28-an de novembro 1998 (10h00 - 17h00)

- ★ Prezentiĝos la kantgrupo AKORDO
- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhalta prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Speciala gasto:
CLAUDE PIRON



Per-sone



• Broadribb: Bel-sperto en Perto

Akademiano, redaktoro de la aŭstralia-nov-zelanda revuo *Esperanto sub la Suda Kruco*, Donald Broadribb edziĝis la 17-an de julio en Perto al Judith Liz Christmas. (*Esperanto sub la Suda Kruco*)

• Haszpra: Jes, akademien

En februaro (p. 38) ni informis pri "rekomendita" membreco de prof. Ottó Haszpra en Hungara Akademio de Sciencoj. Efektive, la 4-an de majo la ĝenerala asembleo de tiu akademio elektis lin sia koresponda membro per 89% de la voĉoj.

• Zamenhof: Eldiras sian nomon

La stando de Brazila Esperanto-Ligo ĉe la 15-a Internacia Librofoiro en San-Paŭlo ricevis viziton de... Zamenhof. Temas pri filo de esperantisto, kiu nomiĝas Zamenhof Sitônio. Ne aktiva movade, li tamen bone prononcas sian nomon. (*Brazila Esperantisto*)

• Moerbeek: Adiaŭ, Amsterdamo

Rob Moerbeek estas ne nur multifunkcia oficisto de la CO: li laboris ekde 1978 ankaŭ kiel privata docento pri Esperanto ĉe Universitato de Amsterdamo.

Post 20 jaroj li elparolos sian adiaŭan publikan lecion la 30-an de oktobro. Tiun vendredon, de 13.30 ĝis 16.45, en la granda aŭlo de la universitata muzeo De Agnietenkapel (Oudezijds Voorburgwal

ANONCETOJ

NI INAŬGUROS la 17-an de okt. straton Esperanto en la vilaĝo Montbel. Gratulmesaĝu propralingve kaj en Esperanto al E-instruantino Claude Fressonnet, Canterate, FR-09600 Montbel kaj/aŭ al la urbestro: M. le Maire, Hôtel de Ville, FR-09600 Montbel, Francio.

KORUSO DE KNABINOJ malpli ol 14-jaraj lernas Esperanton kaj Esperantajn kantojn. Ili deziras kontakti amikojn pere de s-ro Lu Jixin, P.O. Box 81, CN-541004 Guilin, Ĉinio.


KORESPONDI DEZIRAS komencanto: pri Martinus, Lorber, vegetarismo, kosmo ktp. S-ro Lubo Fajth, Rozkvet 2023/45-17, SK-017 01 Považská Bystrica, Slovakio; fajthl@px.psg.sk.

31-JARA STUDENTO serĉas leterkontakton: Markus Wolf, Westring 257, DE-24116 Kiel, Germanio.

DU NOVAJN RETADRESOJN havas Mikaelo Ĉertilov: samiko@glasnet.ru kaj mikaelo@esperanto.nu.

Foto: M. Pieza Toribí

Rob Moerbeek



• Pennacchietti: Plurakademiano

Fabrizio Pennacchietti, kunfondinto kaj vicprezidanto de AIS, iama membro de Akademio de E-o, ano de Akademio Comenius kaj profesoro pri semida filologio ĉe Universitato de Torino (kie de 1994 li gvidas katedron interlingvistikan kaj e-ologian), estis alvokita al Akademio de la Sciencoj, prestiĝa kaj antikva institucio kun Torina sidejo. Krome en majo aperis de li grava libro, originala ekzeĝejo de araba teksto kiu reflektas la biblian rakonton pri Suzana. (C. Minnaja)

231) oficiala adiaŭo estos aranĝita fare de la Fondaĵo "Esperanto en la Instruado", en kiu parolados Hans Erasmus, prezidanto de tiu fondaĵo, F. Winkel, direktoro de la Duagrada Institucio de la sama fondaĵo, M.H.

van Erp-Hoeboer (dankonta nome de la nunaj kaj iamaj studentoj de Moerbeek) kaj Marc van Oostendorp, kiu daŭrigas la Esperanto-studigan tradicion en Amsterdamo jam sur nivelo profesora. (F. Winkel)

Nekrologoj

André CHARRAS (1919-1998), delegito pri naturismo, UEA-membro kvindek-jaroj, mortis julie en Valence (Francio).

Alfred CONZETH (1913-1998) mortis la 16-an de majo en Mettmann (Germanio). Delegito pri presado, li eldonadis *La Radsaltanto*, e-istan bul-tonon en Düsseldorf, publikigis *Kajeroj pri E-teatro* de Zofia Banet-Fornalowa en 3 eldonoj kaj prizorgis E-lingvan faldfoliojn por la Neandertala Muzeo en sia loĝloko.

Marcel CURNIER (1914-1998), longtempa delegito en Bergerac (Francio), forpasis la 14-an de majo.

Katrien DELAVIER (1961-1998) mortis la 22-an de septembro. Proksima kunlaborantino de la kantisto Jacques Yvart, ŝi harpe kaj flute akompanis lin sur lia ĵusa disko de E-lingvaj Brassens-kanzonoj (vd. p. 180). En la Montpeliera UK Delavier ludis en la koncerto de La Kompanoj, sed svenis je ĝia fino, enhospitaliĝis kaj ne povis ludi en la kongresa koncerto de Yvart.



Gaston H. EBOE

Gaston Hoessélo EBOE (1955-1998), iama delegito pri folkloro, vicdelegito en Anyronkopé (Togolando), prezidanto de la loka klubo Espero, mortis la 2-an de julio.

Nikolaj M. FEDOTOV (1902-1998) forpasis la 14-an de aprilo en Novoĉerkassk (Rusio). Esperantisto ekde 1916, li agadis en la jaroj 20-aj organize, varbe kaj per artikoloj. En la 70-

aj jaroj li aktiviĝis kiel tradukisto: liaj esperantigoj el la poezio de i.a. Puŝkin, Lermontov, Fet kaj Gorkij aperis en *Literatura Foiro*, Paco k.a.

Horace HAND (1900-1998), iama delegito en Syracuse (Novjorkio, Usono), forpasis antaŭ nelonge.



Erna HAUGE

la revuojn *Internacia Fervojisto* kaj *Dana Fervojisto*. Ŝi ankoraŭ pretigis ĉiujn presaĵojn por la 50-a IFEF-kongreso (vd. p. 175).

Erna HAUGE (1931-1998) forpasis la 15-an de junio en Brønderslev (Danlando). Honora membro de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj de ties dana sekcio, ŝi redaktis



Anna ALAMO-SANDGREN (1907-1998), dumviva membro, delegito pri kristanismo en Östansjö (Svedio), forpasis antaŭ nelonge. Ŝi prezidis (1944-48) la svedan sektion de Kristana E-Ligo Internacia kaj de 1947 faris, kiel "vojaĝanta sekretario" de tiu sekcio, pli ol 2500 prelegojn en aŭ pri E-o en Svedio kaj alilande. Ekde 1955 ŝi estis longtempe estrarano de KELI.

Werner SCHAUFELBERGER (1916-1998), dumviva membro, iama fervoja delegito, mortis la 4-an de majo en Zuriko (Svislando).

TAKEUTI Tomiko (1934-1998) forpasis la 23-an de aŭgusto en Takatuki (Japanio). Esperantisto de 1955, ŝi kunfondis E-Societon de Takatuki en 1966 kaj kiel ĝia direktoro 32 jarojn konstante prizorgis E-ekspozicion kadre de municipa kultura festivalo. Ŝi estis la edzino de TAKEUTI Yosikazu, prezidinto (nun membro) de Komisiono pri Azia E-Movado.

Jean P. TUFFIER (1914-1998), kvindek-jaroj UEA-membro kaj delegito en Bulonjo-sur-Sejno (Francio), mortis la 30-an de junio.

Hippolyt WIETRZYNSKI (1907-1998), UEA-membro 45 jarojn, iama delegito pri ekonomio, mortis antaŭ nelonge en Bad Salzuffen (Germanio). Li estis dum jardekoj aktiva membro kaj estrarano de Esperanto-Ligo Berlino, redaktoro de *Berlina Informilo*.

Hans ZELLER (1908-1998), esperantisto 70 jarojn, delegito en Steyr (Aŭstrio), forpasis la 7-an de aŭgusto. Li estis sekretario de la loka E-klubo en Steyr, regula kontribuant al la elsendoj de Radio Vieno, honora membro de Aŭstria Esperantista Federacio, kaj membro de UEA pli ol 60 jarojn.

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎+61-2-9810-4227; ✉+61-2-9555-9705; ✉kenderby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financoj): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎/✉+39-06-957-57-13; ✉corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; ✉+39-06-39-72-61-69; ✉lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobrušovice,

Ĉeĥio; ☎+420-2-991-2201; ✉+420-2-991-2126; ✉chrldle@telecom.cz.

Estrarano (agado en Afriko): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Knivilä, Sankt Hans gränd 34 B, SE-226 42 Lund, Svedio; ☎+46-70-636-93-78; ✉kallekn@esperanto.nu.

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA

TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO. Heidi Suonuuti. El la angla trad. Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke. Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92-9017-057-3. 21 cm. Prezo: 12,00 gld.

Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.

La aŭtorino havas longan sperton pri terminologia laboro kiel multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj prezidantino de Teknika Komitato TC 37, *Terminologio (Principoj kaj kunordigo)*, de ISO, Internacia Organizo por Normigado.

La originalo estis verkita laŭ komisio de Nordterm, asocio de terminologiaj organizaĵoj kaj societoj en Nordio. La Esperanto-eldonon preparis Terminologia Esperanto-Centro de UEA kunlabore kun la aŭtorino.



POR SUKCESI EN EKZAMENO



INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Dua eld. Rotterdam: UEA/ILEI, 1998. 34p. ISBN 92 9017 055 7. 21 cm. Prezo: 6,60 gld.

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA mezuras la kapablon uzi Esperanton en praktiko. Centoj da esperantistoj jam ekzameniĝis kun sukceso je elementa aŭ meza nivelo. Tiu

ĉi gvidilo helpas novajn kandidatojn por prepari sin por ekzameno. La postularo kaj regularo klarigas la formalan bazon de la Internaciaj Ekzamenoj. Specimenaj testoj de la du niveloj konigas la praktikan funkciadon de la ekzamenoj.

La libreto taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj.

BAZOJ POR ESTONTA AGADO

ESPERANTO POST LA JARO 2000. Aleksander Korĵenkov. Diskutkajeroj 1. Rotterdam: UEA, 1998. 18p. ISSN 1388-2252. 21 cm. Prezo: 4,80 gld.

Fine de la 20-a jarcento la mondo estas tute alia ol en ĝia komenco kaj la superrego de la angla ŝajnas neskuebla.

Jena eseo provas distingi bazojn por estonta agado de esperantistoj kaj por kreo de pozitiva bildo pri Esperanto kaj esperantistoj. La aŭtoro montras malfortojn de rutinaj kredoj kaj faras kritikajn notojn margene de Kampanjo 2000 kaj la Manifesto de Prago. *Diskutkajeroj* estas nova serio de artikoloj kaj eseoj pri aktualaj temoj, diskutindaj aŭ jam diskutataj en UEA aŭ la Esperanto-komunumo ĝenerale.



TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefona: +31 10 436 1044

Telefaksa: +31 10 436 1751


Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŜIARTO

estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legadon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŜIARTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
Ĉi-jare **KŜIARTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFA 1998

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	35 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	730 frankoj	Hispanio	2200 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	30 guldenoj	Portugallio	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	32000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	105 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

Rikolto de 50 jaroj

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindek de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da librorecenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)




**La libro estas aranĝita en kvar sekcioj:
Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo.
Tre bela grafika prezento.**

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld.
Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO

Internacia Akupunktura Kurso pri Korea Akupunkturo, *Sa-Am*



Akupunkturo estas jam mondvaste konata kuracarto. Neniu do en la nuna mondo plu demandus ĉu akupunkturo vere funkcias. Sed se temas pri akupunkturo, homoj ankoraŭ pensas, ke ĉina akupunkturo estas ĉio.

Internacia Naturkuraca Asocio okazigas specialan kurson pri korea unika akupunkturo, *Sa-Am*, por mondaj medicinistoj kaj naturkuracistoj. En la kurso oni lernos, kiom malsamas inter ĉina kaj korea akupunkturo kaj laŭteorie kaj laŭmetode, miros je ĝia mirakla efiko, kaj fine konstatos, kial uzantoj de *Sa-Am* akupunkturo konsideras ĉinan akupunkturiston kiel infanecan.

Sa-Am akupunkturo, inventita de korea bonzo antaŭ 450 jaroj, baziĝas ne sur klasika akupunkta teorio sed sur la 5 elementaj teorioj. Tial nature malsamas la korea kaj ĉina akupunkturoj je eĉ nadlo-aspekto, pik-maniero, selekt-principo de akupunktoj, kaj fine kurac-efiko mem. Ankoraŭ *Sa-Am* akupunkturo ne estas diskonata en la mondo, kaj fakte eĉ en Koreio malmultaj altnivelaj akupunkturistoj uzas ĝin. Tio estas kial vi devas lerni korean akupunkturiston, eĉ se vi estas sperta kaj profesia akupunkturisto. Se vi estas naturkuracisto aŭ medicinisto, ekposedu novan kaj potencan armilon, per kiu vi povos plej efike servi viajn malsanulojn. Se vi volas renaskiĝi kiel alternativa medicinisto, ne perdu tiun ĉi raran ŝancon.

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO

- La kurso intensive daŭras dum duonmonato.
- Por efika instruo, oni limigas al maksimume 12 homoj en unuopa klaso.
- Oni instruas vin por ke vi tuj praktiku ĝin post kurso kaj hejmmreveno.
- Lernantoj lernos ne nur teorie sed kun rekta kontakto kun malsanuloj.
- Lernantoj loĝos en gastĉambroj eŭropstile ekipitaj.
- Semajnfine okazas urba turismo kaj vizito al grandaj hospitaloj.

PS: 1. La lecionoj okazas en Esperanto kun rekta naci-lingva interpreto, do estas konsilinde, ke unu klaso estu laŭeble samnaciaj.

2. Vi povos mem varbi vialandanojn kaj fariĝi vialanda peranto por neesperantistoj. Perantoj estas alikondiĉe traktataj.

3. Ĝis tiu ĉi jarfino ni varbos, kaj poste informos individue la partoprenontojn pri la detaloj, ekz. dato, instruplano, kosto, kondiĉoj ktp.

Kontaktu kun:

Puramo CHONG, Kwangmyong 2 dong 50-5, Kwangmyong-shi, Kyonggi-do, Koreio; ☎+82 2 682 3456, ☎+82 2 616 1571; aŭ
Harald SCHICKE, Puttjerberg 17, DE-27383 Hetzwege, Germanio; ☎+49 4263 94087, ☎+49 4263 94088.

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO

INTERNACIA AKUPUNKTURA KURSO